



Internacia Bulteno



Germana informilo pri la milito
kun la aldono: Literatura Revuo



Herausgeber (eldonanto): Deutscher Esperanto-Dienst (Germana Esperanto-Servo), Berlin S 59, Wilmanstr. 46 — Verlag (eldonejo): Friedrich Ellersiek, Esperanto-Verlag, Berlin S 59.

La gazeto aperas post la 15a de ĉiu monato
Abonprezo: por 12 monatoj 4.— M. por 6 monatoj 2.— M; unu numero 0.40 M. — Anoncoj laŭ speciala tarifo demandebla ĉe la eldonejo.

No 1 (49)

Januaro 1918

4a Kolekto



La germana komandejo en la urba domo en Udine (Italujo)

Politiko kaj ekonomio

Pri la pacintertraktoj en Brest-Litovsk

ekzistas jam tiom multe da materialo, ke ne estas eble al ni, publikigi en I. B. eĉ nur la plej gravan. Sed ni supozas, ke la oficialaj raportoj pri la intertraktoj estas konataj de niaj legantoj el iliaj naciaj gazetoj. Verŝajne ni poste publikigos la tutan materialon kune en aparta broŝuro de Nova Esperanto-Biblioteko, por konservi ĝin por la estonteco.

Pro la sama kaŭzo ankaŭ la alian oficialan materialon ni de nun limigos je la plej gravaj publikigaĵoj, por pli ol ĝis nun preferi ĝenerale informantajn artikolojn. Ni esperas, ke niaj legantoj konsentos pri tio.

La redakcio

Novjara proklamo de la germana imperiestro

Al la germana armeo kaj la germana marino!

Jaro da malfacilaj, gravaj bataloj finiĝis.

Grandegaj batalegoj, furiozintaj sur belga kaj franca tero, estas deciditaj favore al viaj gloraj bataliloj. En oriento la atakemo de nia armeo per fortegaj batoj rezultigis grandajn sukcesojn. Nun tie ripozas la bataliloj. Brilaj venkoj en malmultaj tagoj nenigis dumjarajn atakarmadojn de la italoj.

En kunagado kun la armeo Mia militŝiparo en kuraĝaj entreprenoj denove pruvis sian energion. Ne erarigeble la submarboatoj faras sian malfacilan, efikoplenan laboron.

Kun fiero kaj admiro ni rigardas al la heroo aro de nia kolonia truparo.

Tiel la germana popolo en armiloj, sur la tero kaj sur la akvo, akiris grandiozon.

Sed niaj malamikoj ankoraŭ esperas, kun helpo de novaj liganaj venki vin kaj tiam por ĉiam detru

la akiritan per severa laboro mondpozicion de Germanujo. Ili ne sukcesos! Fidante pri nia justa afero kaj nia forto ni kun firma konfido kaj ŝtala volo rigardas al la jaro 1918.

Pro tio antaŭen kun Dio al novaj faroj kaj novaj venkoj!

Granda Ĉefstabejo,
la 31an de Decembro 1917.

(subskr.) *Wilhelm I. R.*

Parolado de la germanimperia kanceliero Dro grafo v. Hertling en Reichstag, la 29an de Novembro 1917

Sinjoroj! Per la konfido de Lia Majesto la imperiestro alvokite en ĉi tiun lokon, mi havas la honoron, saluti la Reichstag. Mi ne volas preterlasi, tuj elparoli al sinjoro via honorata prezidanto mian dankon pro la afablaj paroloj, kiujn li direktis al mi. La sonigita de li tono de reciproka konfido postsonu en ĉiuj niaj pluaj intertraktoj! (Aplaudoj)

Sinjoroj, kiel sinjoro via prezidanto jam diris, mi ja ne estas fremdulo inter vi. En du periodoj, disigitaj per sesjara intertempo, mi estis dum pli ol 30 jaroj membro de tiu ĉi parlamento. Mi kunlaboris en diversaj kampoj kun anoj de ĉiuj partioj. Kiam en Februaro 1912 mi estis vokata al la estreco de l' bavara ministraro, kaj kiam per tio al mia parlamenta agado fino estis farata, mi foriris de ĉi tie kun la konscio, postlasi tie ĉi multajn amikojn, kelkiun politikan kontraŭulon, sed, laŭ mia konfido, ne iun personan malamikon. (Tre prave!)

En ĉi tiu konfido, sinjoroj, kaj en dankema rememoro pri tiuj jaroj mi nun prezentas min al vi. Se mi decidigis, en tiel tumultovita tempo surpreni la malfacilan kaj respondecan oficon de germanimperia kanceliero, se mi repuŝis la gravajn skrupulojn, kiuj povis rezulti jam sole el mia aĝo, min gvidis la konvinko, ke estas devo, ne rifuzi la taskon ne volite al mi alirintan, ke estas devo, alporti al la patrolando ĉiun oferon, eĉ la plej

malfacilan. Mi pensis pri niaj fratoj kaj filoj, kiuj de 40 monatoj ĉiutage ekstere en la militkampoj estas pretaj, riski sian vivon por la patrujo. Ilia ekzemplon mi volis sekvi. (Vigla Brave!) El ĉi tiu sentado, sinjoroj, mi sekvis la direktitan al mi vokon de Lia Majesto, en ĉi tiu sentado nun, sinjoroj, mi petas vin pri via konfida kunlaboro. (Vigla brave!)

Sinjoroj, ni proksimiĝas al la fino de jaro, kiu sur la multaj militejoj alportis ampleksajn decidojn. Fiere kaj dankeme ni rajtas memorigi pri tio, ke preskaŭ ĉiutage kaj preskaŭ ĉie niaj bataliloj, la propraj kaj tiuj de niaj samliganoj, estis akompanataj de sukceso. En okcidento, pri kio sinjoro via prezidanto ankaŭ jam aludis, la batalo en Flandrujo daŭras preskaŭ sen interrompo de Julio nunjara. Preskaŭ la tuta angla armeo estas partoprenigita en la flandra ebenajo en laŭnombra supereco kontraŭ nia fronto. Ankaŭ kelke da francaj divizioj partoprenis la batalon. Nia flandra fronto malgraŭ la perdo de kelkaj vilaĝoj kaj bienetoj restis tute ne skuita en si, kaj la malamiko poste kiel antaŭe estas malproksima de sia celo: atingo al la flandra marbordo, por malutiligi nian submarboatar bazon. Ekkonante ĉi tiujn ne utilajn kaj perdoriĉajn atakojn en Flandrujo, la angloj nun denove serĉas decidon ĉe Cambrai. Pri la artileria preparo daŭranta kelkajn tagojn, kiu ĝis nun kutimis antaŭiri iliajn atakojn, ili ĉi-foje rezignis kaj anstataŭ tio grandnombre veturigis tankojn. Sed la espero, sinjoroj, kiun ili havis rilate al ĉi tiu militilo, malgraŭ ilia amaso ne pruvis sin ĝusta. Sekve de niaj sukcesaj defendaranĝoj la tankoj kuŝas detruitaj sur la batalejo. (Brave!) La komencaj sukcesoj tie atingitaj de la angloj estis rebatataj per la ekpartopreno de niaj rezervo. Ankoraŭ la batalo daŭras; estraro kaj trupoj kun plena fido vidas renkonte al la fino. (Vigla Brave!)

La francoj nordoriente de Soissons kaj antaŭ Verdun havis lokajn sukcesojn; sed ili ne sukcesis ekspluati ilin, ĉar niaj trupoj tuj faris rapidajn kontraŭpuŝojn, kiuj al la malamiko

malpermesis ĉiun strategian ekspluaton.

La militaj okazintaĵoj en oriento, kiuj kondukis al la konkero de Riga kaj Jakobstadt, estas en la memoro de vi ĉiuj.

La glora antaŭenpenetrado de la interligitaj armeoj en Italujo ankoraŭ hodiaŭ tenas la mondon en atentego. Grandiozaĵo tie estis efektivigata de la batalforto de germanaj kaj aŭstrihungaraj trupoj sekve de la rapida trarompa atako tra ne pasebla montara teritorio ĝis en la ebenajo. La itala armeo perdis gravan parton de sia homprovizo kaj minimume la duonon de sia tuta militmaterialo. Ĝi perdis teritorion donantan frukto-donajn produktojn; se ni transkalkulus la tutan akiraĵon en monon, ni povus kalkuli je akiraĵo sumiganta je miliardoj. Certigi la kaptajn tute ne ankoraŭ estis eble ĝis hodiaŭ.

Plua sukceso de niaj venkoj de Isonzo ĝis Piave estas efika malsarĝo de nia okcidenta fronto.

Sammaniere tiu ĉi venko igas sin sentebla ankaŭ en Macedonio; ĉar la malamiko laŭŝajne libervole ree volas rezigni la malgrandajn sukcesojn, kiujn li akiris okcidente de la Ochrida-lago.

De el la Sinai-duoninsulo la angloj agadas kontraŭ la turkaj trupoj en Palestino, kaj ili ankaŭ kapablis, tie unue akiri iajn sukcesojn. Influantaj la ĝeneralan milit-situacion ili ne estas.

En la militejo de Malgrandazio kaj en la Irak-teritorio la situacio ne ŝanĝiĝis.

Nia militŝiparo nepre plenumis la esperojn kaj atendojn metitajn je ĝia juna forto. La vastmara ŝiparo, kies senĉesa, al la rigardoj de l' publiko multfoje kaŝita agado meritas la dankon de l' patrujo, de post sia glortago antaŭ Skagerrak nun post iom longa paŭzo antaŭ ne longe denove pruvis sian ĉiaman batalpretecon, forprenante la insulojn Oesel, Dagö kaj Moon en modela kunlaboro kun la surtera armeo kaj ĉe la mallonga sukcesa bataleto en la germana golfo de l' Norda Maro kontraŭ grava supereco. Kiel gardo kaj apogilo ĝi staras post niaj submarboatoj. Ĝi ŝirmas iliajn bazojn

kaj liberigas al ili la vojon en la liberan maron.

La submarboata komercmilito, sinjoroj, efektivigas laŭplane sian potencon kaj ne eviteblan efikon. (Vigla aplaŭdo) Ĝi estis kaj estas la sola sukcese efika rimedo de la ekonomia milito surdevigita al ni, por trafi je lia vivonervo nian plej danĝeran malamikon, la veran gvidanton de la tuta malamika kaj en malamikaj servoj veturanta ŝipvolumento. Kvankam niaj kontraŭuloj de kelka tempo penadas kompletigi la maldensigitajn provizojn de sia komerca ŝiparo per neŭtralaj ŝipoj, kiujn ili perforte eldevigis per malsatblokado kaj aliaj premiloj, tiu ĉi procedo tamen ne povas laŭplaĉe esti daŭrigata kaj baldaŭ atingos sian limon, kaj malgraŭ la kiom ajn streĉita novkonstruado de ŝipoj en la ŝipfarejoj de niaj kontraŭuloj la surfundiga cifero ĉiam superos la ciferon de l' novkonstruado. Tiel ĉiuj observoj liveras la konvinkan pruvon, ke la submarboata komercmilito atingos la celon al ĝi metitan. (Vigla aplaŭdo) Tiel ĉiuj observoj, kiujn ni povas fari pri la situacio de nia armeo kaj de nia marino, donas novan nutraĵon al nia fidemo, al nia certeco pri la venko.

Sed, sinjoroj, ni ne povas paroli pri la milita situacio, ne memorante per la sentoj de senĉesa danko pri tiuj, al kiuj ni ŝuldas tiujn ĉi sukcesojn, tiun ĉi favoran situacion: al nia glora armeo kaj al la marino (vigla aplaŭdo) al ilia genia estrado (ripetita vigla aplaŭdo) kaj al niaj bonegaj trupoj. (Ripetita vigla aplaŭdo)

Se mi ĉe tiu ĉi okazo deziras tute precipe memori pri la trupoj ĉe la okcidenta fronto, pri kiuj ankaŭ sinjoroj via prezidanto jam atentigis, kiuj de pli ol tri jaroj kontraŭstaras al grandega supereco da homoj kaj militmaterialo, en sindona fideleco kaj persista konstanteco, tio kompreneble ne okazas, por plimalgrandigi la ne kompareblajn meritojn de tiuj armeoj, kiuj kune kun niaj fidelaj samliganoj tra ne paseblaj teritorioj lavangosimile enpenetris en la kamparon de Supra Italujo, por puni la malfidelan Italujon. (Vigla aplaŭdo)

Sed, sinjoroj, vi ĉiuj scias: nia venkoplana ofensivo en Ruslando 1915, en Rumanujo 1916 kaj ankaŭ la venkorica, al ni novajn venkojn promesanta militiro kontraŭ Italujo, ili ne povis esti efektivigataj per la sama forto, se la bronza muro en okcidento ne estus kontraŭstarinta al la plej furioza alkurego. (Ĉiufanka vigla konsento kaj Bravo-krioj) Al ĝi konvenas la speciala danko. (Denova aplaŭdo) Ne forgesata estu ankaŭ la heroo braveco de nia gardotrupoj en Orientafriko kun la bravaj koloniistoj kaj indiĝenoj. (Aplaŭdo)

Sinjoroj, sed la sama danko kiel tiu, kiun ni ĉiam denove prezentas al la popolo en armiloj, sama danko konvenas ankaŭ al la popolo en la hejmlando. (Tre bone!) Ankaŭ la popolo en la hejmlando estas plenigata de la sama ne fleksebla venkovo; ankaŭ la popolo en la hejmlando helpas akiri la venkon. Trankvile kaj konstante ĝi eltenas la malhavojn kaj kontraŭaĵojn, kiujn la milito alportas kun si; celkonscie kaj oferprete la virinoj alpremiĝas al la laboroj kaj servoj, de kiuj la viroj estis forvokataj. En ĉiuj rondoj kaj rangoj de la loĝantaro fervora konkurso montriĝas, streĉi ĉiujn fortojn de l' ekonomia kaj financa vivado, por doni al la milito la necesajn helpojn. (Vigla Brave!)

Nia de komenco de l' milito efikigata metodo de la militfinancigo en ĝojiga maniero sin pruvis bona. En regula sekvo la imperio ĝis nun sepofoje apelaciis al la germana popolo, pretigi al ĝi la monrimedojn por la daŭrigo de l' milito. Ĉiuj rondoj de l' popolo en pagado kaj varba laboro konkuradis, por ke ĉiu siaflanke helpu, porti la ŝarĝojn de l' milito. Sumoj, kiuj en la pasintaj pacjaroj estus ŝajnintaj al ni fantaziaj — preskaŭ 73 miliardoj — estas alportitaj per liberolaj asignoj kaj uzitaj por la daŭrigo de l' milito. (Vigla aplaŭdo) Se en ĉi tiu loko mi elparolas la dankon de l' patrolando al ĉiuj, kiuj helpis por ĉi tiu grandioza ago, tio ne okazas tial, ke mi povus atendi de tio, ke ili, kiel ĝis nun, neniam lacaj, plue agos en la sama maniero. Ankaŭ se mi ne

estus elparolinta ĉi tiun dankon, ili tion estus farintaj en la intereso de l' patrujo. (Tre bone!)

La kredito, laste konsentita de la alta parlamento en Julio nunjara, proksimiĝas al sia elĉerpiĝo. Tial mi havas la honoron, prezenti al la alta parlamento kompletigan etaton kun nova kreditpostulo, en la sama alteco kiel la lasta, por laŭkonstitucia decido. Mi petas la Reichstag, per sia konsento pri la nova kreditpropono denove ekkonigi, ke ankaŭ ĝi estas preta, fari ĉion, kion la patrujo postulas, ke ĝi pretigas la monrimedojn por la daŭrigo de l' milito. La likvidado de la kreditoj, por kiuj la propono min rajtigu, okazos en la ĝisnuna maniero. La alteco de la postulataj kreditoj estas ankaŭ la sama kiel lastfoje.

Sinjoroj, ke la milito, kaj precipe tia terura milito, kian la mondo ĝis nun ne konis, ne nur postlasos profundajn postsignojn en la popola vivado, sed ankaŭ donos novajn taskojn, alkondukos al novaj formigoj, tion ni devis atendi, eĉ se la historio de antaŭaj tempoj ne estus preparinta por tio. Grandega travivaĵo ekkaptis nian tutan popolon kaj rezultigis en ĝi pli ol iam la konscion de l' kuneco. La ideoj pri popolo kaj ŝtato, pri nacio kaj patrujo, kiujn ni ĝis nun laŭkutime konservis kiel transiĝintan heredajon, ili nun de ĉiu unuopulo el la tuta popolo estas komprenitaj kiel lia plej propra propraĵo en sia tuta valoro de post la tago, kiam la tuta popolo levigis kiel unu viro, de kiam ekstere en la batalkampo niaj filoj kaj fratoj ĉiutage elmetas sian vivon. Kaj ne nur tio, ankaŭ la laboristo en la laborejo, ankaŭ la kamparano post la plugilo, li scias, ke la laboro, kiun li faras en malfacilitaj cirkonstancoj, estas farita por la patrujo. Li sentas sin membro de l' unu tuto, li scias, ke la ŝtato, sub kies protekto li ĝis nun plenumis sian laboron, estas lia plej propra propraĵo, lia afero, lia posedaĵo. (Brave!)

Pro tio ankaŭ la granda intereso, kiu montriĝas ĉiutage pri la ŝtataj institucioj. Oni alproksimiĝas al ili

kun la demando, ĉu ili sukcesis en la provo, kiun la milito prezentas al ili, aŭ ĉu ili cedu al aliaj aranĝoj.

En tio, sinjoroj, antaŭ ĉio estas grave, ekkoni la ĝuston, kaj realigi la ekkonitaĵojn per firma mano. (Tre prave! maldekstre) Speciale estas grave, ne lasi erarigi sin per signaj paroloj, kaj ne sklave imiti la aranĝojn de fremdaj nacioj. (Tre prave! dekstre kaj ĉe la nacialiberaluloj) Estas grave, fari tion, kio estas postulata de la realaj bezonoj de nia popola vivado, kio respondas al la germana spirito kaj al germana originaleco. (Vigla aplaŭdo) La fundamentoj de nia imperia konstitucio ne devas kaj ne povas esti ŝanĝataj. (Tre bone! dekstre) Ĝi en vera senco elkreskis el la historie fariĝinta karaktero de la germana popolo kaj de ĝiaj diversaj gentoj. (Tre prave! dekstre) Reichstag, la parlamenta reprezentantaro de l' popolo, staras sur la plej larĝa bazo. Se la moviĝanta sur tiel firmaj fundamentoj politika vivado prezentas novajn taskojn, se en la kadro de l' imperia konstitucio rezultas novaj bezonoj, la imperia estraro ĉiutempe — pri tio mi estas certa — favore aŭskultos dezirojn kaj stimulojn, kiuj atingas ĝin el ĉi tiu alta parlamento, kaj submeti ilin al kompetenta esploro.

Kiel kompreneble mi konsideras, ke la socialpolitiko, en kiu Germanujo antaŭiris ĉiujn landojn de Eŭropo, ĉe kies unuaj komencoj mi mem kiel Reichstag-deputato rajtis kunlabori, estos daŭrigata en la ĝisnuna maniero kaj laŭ bezono finkonstruata. (Aplaŭdo) Al Reichstag ĉe ĝia venonta kunveno estos prezentata la projekto por leĝo pri la aranĝo de laborĉambroj, kiu aliĝos al la laboroj de la Reichstag-komisiono de 1910, kaj en ili trovos valoran fundamenton. (Vigla Brave) Same estas preparata leĝprojekto, kiu forigu tiujn limigojn de la koalicia libereco, kiuj rezultas el la § 153 de l' imperia industriregulato. (Denova aplaŭdo) Ankaŭ ĉi tiu leĝprojekto estos prezentata al Reichstag en ĝia venonta kunveno.

Ke ankaŭ la registaroj de la federitaj ŝtatoj partoprenas la percepton,

kiun mi ĵus klarigis, sinjoroj, estas certe. Ili ĉiuj scias, en kiel grandioza maniero en la plej potenca federita ŝtato la iniciativo por ampleksa reformo estas ekprenita de el la plej alta loko. Mi nun kaj ĉi tie nenion havas por diri pri ĉi tiu afero.

Koncerne la cenzuron mi volonte estas preta, havigi al la libera esprimo de l' opinio ĝian rajton, kiom patrolandaj interesoj tion ne kontraŭstaras. Iaj limoj dum la milito ja ne estas eviteblaj. La gazetaro siaflanke ja tute ne povas ĉiufoje ekkoni, ĉu sciigoj, kiujn ĝi estas faronta, diskutoj, kiujn ĝi estas publikigonta, estas utilaj aŭ malutilaj por niaj militistaj interesoj. Ĝi tial bezonas laŭ ĉi tiu direkto la gvidadon kaj kontrolon.

Kontraŭe al la severaj cenzur-disponoj en la malamikaj landoj ni ja jam hodiaŭ troviĝas en la situacio de ludanto, kiu estas devigata, ludi per malkovritaj kartoj, dum la kontraŭuloj ĉiam zorgeme kovras la siajn. (Tre bone!) Vi ĉiuj, sinjoroj, ja legis, kiel kategorie sinjoro Clémenceau ankoraŭ antaŭ ne longe rifuzis ĉiun moderigon de la cenzuro. (Aŭskultu, aŭskultu!) La sama Clémenceau, kiu kiel eldonanto de „Homme enchaîné“ kun la plej granda akreco batalis kontraŭ la cenzuro. (Aŭskultu, aŭskultu! Gajeco) Sed estas mia serioza klopodo, forigi malbonajn statojn kaj rajtigatajn plendojn kaj malebligi ilian revenon. (Brave! en la Centro) En tiu ĉi senco intertraktoj kun kompetentaj militistaj lokoj jam okazis. Ilia rezulto estas dekreto de sinjoro la militministro de la 18a de l' nuna monato, en kiu deziroj de la gazetaro kaj deziroj de Reichstag trovas rajtigitan korekton. Precipe koncerne la malpermeson de gazetoj moderigo okazos, pli intima rilato inter la eldonistoj kaj la cenzurejo okazos. Mi sincere klopodas, sur ĉi tiu vojo, se eble, progresante forigi la priplendatajn de mi malbonstatojn, se eble, cedi al ĉiuj deziroj, kaj mi esperas, ke en la daŭro de l' tempo kaj kun bona volo en ĉiuj flankoj oni sukcesos alkonduki statojn, kiuj ne plu aŭdebligis tiuspecajn plendojn, kiaj ĝis nun rajte laŭtiĝis.

La samo, kiel mi volas eksprese aldoni, valoras ankaŭ rilate la unuigo-kaj kunvenrajton. Sed aligante al ĉi tio, sinjoroj, mi nun deziras kun ĉiu seriozeco kaj ĉiu energio direkti al vi la peton: Flankenigu laŭeble ĉiujn diferencojn de l' opinioj. Por la disputoj pri partiaj kontrastoj estos sufiĉe da tempo post la milito! (Konsento — Alvokoj ĉe la sendependaj socialdemokratoj) Nun valoras, unue kaj firme kunstari, ĝis kiam la venko estos akirita. Ke ili ne povas forŝiri de ni tiun ĉi venkon per la bataliloj, niaj malamikoj jam komencas kompreni; sed nun ili alkreacas siajn esperojn al laŭ ilia opinio estonta interna ruiniĝo. (Tre prave! dekstre) Ne konante niajn germanajn cirkonstancojn, nian parlamentan vivadon, nian liberece direktitan unuigon kaj kunvenan leĝaron, malĝuste kondukite de dependa kaj incitema gazetaro ili en iaj unuopaj okazoj, en iaj preterpasantaj aperaĵoj volas rigardi la klarajn simptomojn de interna disolvigo. Helpu, sinjoroj, detruu ĉi tiun iluzion. (Tre bone! — Alvokoj de la sendependaj socialdemokratoj) Montru per via unueca kunesteco, kun kiu vi staras al la imperia estraro, ke en Germanujo ekzistas nur unu penso, kiu plenigas ĉiujn korojn, la penso pri la patrolando (vigla Brave), ke ĉiuj membroj de la popolo estas regataj nur de la unu volo: atendadi kaj persisti ĝis la fino. (Vigla aplaŭdo)

Permesu nun al mi, sinjoroj, ankoraŭ kelkajn parolojn pri la ĝenerala situacio! De sinjoroj miaj altestimataj antaŭuloj mi ricevis multvaloran heredaĵon: la konservadon de la amikaj interrilatoj al Aŭstrio-Hungarujo, al Turkujo, al Bulgarujo. Niaj ligoj kun tiuj tri ŝtatoj estas kreitaj en malsamaj tempoj. Sed ilia celo ĉie estas la sama: la efektiviĝo de la naciaj idealoj, la certigo de la teritoria stato kaj kontraŭbatalo al la malamikaj atakoj. La morala valoro de tiuj celoj ŝtaligas nian decidemon en la sangoplenaj bataloj, kiujn ni faris kune kun ili, kaj ankaŭ plue konservas ĉi tiun nian decidemon ĝis la fino. Per la defendo de la plej sanktaj

havaĵoj kunkondukite kun tiuj batalilfratoj, ni volas helpi nin reciproke ĝis la venko. (Vigla aplaŭdo) Sed al ili, tiuj fidelaj samliganoj, kune kun kiuj faroj de ne komparebla grandeco estas plenumitaj, al ilia oferemo, al ilia decidemo, al ilia ligofideleco konvenas ankaŭ hodiaŭ nia danko kaj nia admiro. (Denova vigla aplaŭdo)

Nun, sinjoroj, mi estas en la felica situacio, komuniki al vi ion novan. La rusa registaro hieraŭ direktis de el Carskoje Selo al la registaroj kaj popoloj de la militantaj landoj radio-telegramon subskribitan de la popolkomisario por eksteraj aferoj, sinjoro Trotzki, kaj de la prezidanto de l' konsilantaro de la popolkomisario, sinjoro Lenin, en kiu ĝi proponas, en proksima templimo komenci intertraktojn pri batalhalto kaj ĝenerala paco. (Brave!) Sinjoroj, mi malkaŝe deklaras, ke en la ĝis nun konatiĝintaj proponoj de la rusa registaro diskutablaj fundamentoj por la komenco de intertraktoj povas esti rigardataj (Brave!), kaj ke mi estas preta, eniri en tiajn, tuj kiam la rusa registaro sendos reprezentantojn rajtigatajn por tio. (Vigla Brave maldekstre kaj en la Centro) Mi esperas kaj deziras, ke tiuj klopodoj baldaŭ akceptos pli firman formon kaj alportos al ni la pacon. (Brave!)

Kun sincera intereso ni priatentas la evoluon de la malfelica rusa popolo. Ni deziras, ke kiel eble plej baldaŭ ĝi ree ricevu trankvilajn kaj ordigitajn cirkonstancojn. Ni deziras nenion pli, ol ke denove estu atingata la najbara interrilato, precipe sur ekonomia teritorio, kian ni konis en antaŭaj tempoj inter ni kaj la orienta najbaro. (Brave!) Koncerne la antaŭe al la sceptro de la caro subigitajn landojn Polujo, Kurlando, Litovio ni respektas la rajton pri memdestino de iliaj popoloj. (Brave! en la Centro kaj maldekstre) Ni atendas, ke ili donos al si mem tiun ŝtatan formon, kiu respondas al iliaj cirkonstancoj kaj al la direkto de ilia kulturo. (Brave! en la Centro) Cetere, sinjoroj, ĉiuj ĉi tiuj aferoj ankoraŭ ne estas deciditaj. Sciigoj, antaŭ kelke da tempo irantaj tra la gazetaro, kvazaŭ

en iu loko jam konkretaj interkonsentoj estas faritaj, multe antaŭenrapidas la faktojn.

Alia estas nia situacio kontraŭe al Italujo, Francujo, Anglujo. De kiam ni kaj niaj samliganoj en la respondo al la pacalvoko de l' papo starigis sur la fundamento de l' papo noto de la 1a de Aŭgusto, kompreneble estas fortirita ĉiu bazo de la malsaga babilado, ke temas pri tio, en la nuna milito fari finon al la germana militarismo minacanta la pacon. Kontraŭe, sinjoroj, evidentiĝas, kie en vero la pacmortiganta militarismo estas serĉota. (Tre prave!) En sia parolado de l' 26a de Oktobro nunjara la itala ministro Sonnino plene rifuzis la ideon pri ĝenerala malmobilizo. (Aŭskultu, aŭskultu!) La motivo de tio estas sufiĉe karakteriza. Oni laŭdire ne povas malhavi la konstantajn armeojn pro la ebleco de internaj danĝeroj. (Aŭskultu, aŭskultu!) Kaj sinjoro Clémenceau en sia cinismo eĉ riskis eksprese escepti Germanujon kaj Aŭstrio-Hungarujojn el la paca popolkomuneco de l' estonteco, en kiu la juro anstataŭu la potencon de la bataliloj. (Aŭskultu, aŭskultu!) Lloyd George fine klarege deklaras, ke la celo de l' milito estas la neniigo al la germana komerco, ke la milito devas esti daŭrigata, ĝis kiam tiu celo estos atingita! Sinjoroj, kie estas trovebla la konkeremo malĝuste riproĉata al Germanujo, tio por la tuta mondo ja estas nun metita en la plej helan lumon per la siatempe faritaj sekretkontraktoj, kiuj nun estas publikigitaj de la rusa registaro. (Tre prave! maldekstre)

Nia militcelo, sinjoroj, de post la unua tago estis la defendo de l' patrolando, la nedifektebleco de ĝia teritorio, la libereco kaj sendependeco de ĝia ekonomia evoluo. (Konsento de ĉiuj flankoj) Tial ni povis bone saluti la pacalvokon de l' papo. Ankoraŭ hodiaŭ nin animas la sama spirito, kiu diktis la respondon al la papo noto.

Sed, sinjoroj, tiu respondo al la papo noto ne devas esti konsiderata de la Entente-ŝtatpotencoj kiel privi-

legio por la krimea plilongigo de l' milito. (Vigla ĉiufanka konsento) La respondeco pri ĉi tiu daŭrigata mortigado, pri ĉi tiu detruado de ne kompenseblaj kulturvalorajoj, pri la freneza memfrakasado de Eŭropo trafas sole la ŝtatpotencojn de Entente, ili portas la respondecon, kaj ili ankaŭ devos porti la sekvojn. (Vigla aplaŭdo)

Precipe S-ro Sonnino lasu tion esti dirita al si. (Tre bone!) Se la italaj potenculoj, kiuj enpelis en la militon la malfeliĉan loĝantaron de la bela lando aligita al ni germanoj per mil-oblaĵaj rememoroj, estus ekprenintaj la multe etenditan pacmanon de l' papo, ili ne devis travivi la teruran katastrofon de sia armeo kun ĉio, kio aliĝis al tio; ili portas la respondecon pri tio, kaj iliaj amikoj en Italujo kaj Francujo lasu tion servi al si kiel averton, ili fine aŭskultu la voĉon de prudento kaj de humaneco! (Vigla aplaŭdo)

Por ni, sinjoroj, la signaldiro en la nuna momento ne povas esti alia ol atendi, atendadi, persisti! (Vigla aplaŭdo) Ni fidas al Dio kaj nia justa afero, ni fidas al nia armeo, ni fidas al niaj grandaj armeestroj, kies nomon oni nur bezonas citi, por tuj senkatenigi ventegon de entuziasmo. (Ĉiufanka vigla Brave) Ni fidas al niaj heroaj batalantoj sur tero, sur akvo kaj en la aero. (Vigla Brave) Ni fidas al la morala forto kaj al la spirito de nia popolo. Se armeo kaj hejmlando firme kunstaras, la venko estos nia. Por tio, sinjoroj, vi volas kunhelpi, tion mi scias, kaj tial mi petas vin ankoraŭfoje pri via konfida kunagado. (Vigla, daŭranta aplaŭdo kaj manklakado) (N. A. Z. 358)

Ŝtatssekretario von Kühlmann en la Ĉefkomisiono de Reichstag

Berlin, 30. 11. 1917.


En la hodiaŭa kunsido de la ĉefkomisiono de Reichstag post la raportinto princo Schönauich-Carolath ekparolis la ŝtatssekretario de la ministerio de l' eksteraj aferoj Dro von Kühlmann.

Post mallongaj konfidenciacaj informoj li priparolis la cititan en la rusaj

sekretaj dokumentoj laŭdiran *interkonsiliĝon de financistoj en Svislando*. Jam pli frue aperis similaj famoj. La esploroj tiam faritaj rezultigis, ke germanaj financistoj ne partoprenis en tiaj konferencoj. La angla registaro siaflanke dementis la partoprenon de anglaj financistoj. Nunfoje reprezentantoj de la Germana Banko kaj sinjoro Fürstenberg estas eksprese menciataj. Al demando de la ŝtatssekretario la Germana Banko respondis, ke neniu el la sinjoroj proksimaj al ĝi tiam estis en Svislando. Ankaŭ neniu el ili havis pasporton por vojaĝo en Svislandon. Sinjoro Fürstenberg ja havis pasporton, sed ne uzis ĝin. Nek ili nek persono proksima al li en la koncerna tempo estis en Svislando. Post detala esploro oni do povas deklari, ke la Berna raporto de la rusa diplomato baziĝas sur klaĉo kaj mankhavaj informoj.

La ŝtatssekretario poste daŭrigis: Sinjoroj! Niaj rigardoj en la nuna momento antaŭ ĉio estas direktitaj *orienten*. Ruslando, kiu ĵetis la militotorĉon en la mondon, Ruslando, en kiu putra ĝis en la medolo de l' ostoj bando de burokratoj kaj parazititoj, flankenŝovantaj aŭtokraton eble kelkfoje bonintencan, sed malfortan kaj malbone gviditan, elruzis la mobilizon, kiu fariĝis la vera kaj senpera kaŭzo de ĉi tiu grandega popolkatastrofo, forbalais la kulpulojn kaj nun en dolora krizo batalas, gajni per batalhalto kaj paco agliberon por sia interna rekonstruo. Al la klaraj vortoj, per kiuj sinjoro la imperia kanceliero hieraŭ elmontris la orientiĝon de la germana registaro kontraŭ tiu celado, mi ne bezonas miaflanke aldoni ion. Ni ankaŭ en tiu demando ne forlasos la principojn de firma kaj modera politiko restanta sur la fundamento de la faktoj.

La principoj, komunikitaj de la hodiaŭaj potenculoj en Petersburg al la mondo, ŝajnas taŭgaj kiel bazoj por novordigo de la aferoj en la oriento, kiu — plene konsiderante la rajton de la popoloj, mem decidi pri si — estas taŭga, sendanĝerigi la esencajn kaj daŭrajn interesojn de la du grandaj najbaraj regnoj Ruslando kaj Germanujo.



La urbo Riga, rigardata de sur la turo de l' preĝejo de Petro

Ke ni povas sekvi tiujn celojn en plej akorda konsento kun niaj liganaj kaj, kiel ŝajnas al mi, ankaŭ kun la morala subteno de la granda pliparto de la kunvenintaj ĉi tie reprezentantoj de la germana popolo, sentigas al mi specialan kontenton kaj al nia konduto donos ankaŭ la necesan movenergion kontraŭ la ekstera mondo.

Pri la *militista situacio* vi hieraŭ el la buŝo de la imperia kanceliero aŭdis detalajn klarigojn. Tial mi hodiaŭ deziras kontentigi, diri malmulte da vortoj pri la *militiro en Italujo*, kiu ankoraŭ estas en plena funkcio kaj kies politikaj sekvoj, kvankam kompreneble ankaŭ ne plene takseblaj, en kelkaj punktoj jam klare rekoneble reliefigis.

Estis bildo, eĉ en la nuna grandega giganta batalo ankoraŭ ne vidita, kiam trans la grizan Karst-on tra la aŭtune ruĝaj intermontaĵoj de la alpovaloj la grizaj serpentoj de germanaj kaj aŭstri-hungaraj kaskoj malsupren ruliĝis en la surbrilatajn ebenaĵojn de Italujo, kiuj de la tagoj de l' dinastio de Hohenstaufen efikis tiel magie altirante je germana sopiro, kaj kiam sub la ĉefkomando de la juna imperiestro el la gento Habsburg la tuta armeo de granda popolo frakasigis sub la pezaj martelbatoj, kiuj fariĝis tiom karakterizaj por la strategia genio de la interligitaj ŝtatpotencoj kaj torento retiriĝis.

Kun neniŭ lando de Eŭropo la spirita mondo de Germanujo havis tiel intimajn interrilatojn kiel kun Italujo. La nove unuigita ŝtato en la ombro de la potenca Triligo estis akirinta respektatecon, potencon kaj riĉecon, kaj kvankam ne direbla maldolĉo estis sentata ĉe ni, kiam malfrue en la milito — ĉar kelkaj stultuloj kredis, ke alvenis la horo, por doni al la pafvundita germana apro la finpuŝon — Italujo ĉe la kreado de subaĉetita gazetaro kaj kondukate de senkonsciencaj kaj proksimvidaj politikistoj pro nura landavido decidiĝis al la hontinda politiko, por kiu ĝi hodiaŭ tiel sange suferas, tamen en la nuna horo de plena ruiniĝo kelkiu al la itala *popolo* ne povos rifuzi ĉiun kompaton.

Se mi antaŭe parolis pri la sekvoj de la militistaj sukcesoj, ĉi tiuj ankaŭ en *Anglujo kaj Francujo* estas rimarkeblaj, kaj mallonga rigardo al la tempe paralela interna evoluo en Germanujo kaj en tiuj landoj supozeble estos instrua.

Dum en *Germanujo* en la daŭro de la milito la granda imperiestra parolo, kiu markis ĝian komencon, plue estis fruktodone evoluigata per laboro kaj la rilatoj inter la popolo kaj la krono sur la bazo de reciproka konfido fariĝas pli kaj pli liberaj, viglaj kaj pro tio firmaj, dum en Germanujo la registaro ne sub premo de ekstere, sed en libera ekkono pri historie necesaj evoluoj efektivas tion, kion la hieraŭa parolado de sinjoro la imperia kanceliero programe prezentis al vi, en la du landoj, kiuj ŝatas konsideri sin en la mondo kiel rifuĝejojn kaj pionirojn de populara libereco, la evoluo estis ĝuste mala. La libereco de pensado, la libereco de parolo estas subpremataj — parte per plej brutaj perfortiloj. Ĉio en la okcidentaj demokratioj pli kaj pli tendencas al absoluta diktatoreco.

En *Francujo* la obstinega militemo, kies portanto devas konsideriĝi antaŭ ĉio prezidanto Poincaré, kiel lastan karton en la ludo de la milito ĉiukondiĉa, ĝis la amara fino, investis sinjoron Clémeŭceau per la potenco, kaj dum en Berlino la kanceliero en detala konsiliĝo kun la partioj diskutas la bazojn de la intencataj disonoj de la registaro, la gazetoj sindonaj al sinjoro Clémeŭceau gloris, ke li kunmetis sian ministraron sen ia informiĝo kun la parlamento absolutisme kaj diktatore, kaj, kiel unu el la unuaj agoj de la registaro, akra persekuto al pacifistaj celadoj estis anoncata.

En *Anglujo* la nun finita en Francujo evoluo jam pli frue okazis. Tie la partio de la ĉiukondiĉa milito jam antaŭ kelke da tempo sinjoron George metis sur la ŝildon kaj donis al li prokuron, kiu lin, malzorgante ĉiujn singardilojn tiom karajn al la angla konstitucio, fakte faris diktatoro. La „malgranda sorĉisto el Wales“ eble malgraŭ ĉia bonvolo, militi kiel eble

plej senindulge, ne plenumis ĉion, kion liaj amikoj esperis de li. Sed ĉar, se oni ne ankoraŭ elektos lordon Northcliffe, neniu ekzistas, kiu superas sinjoron George je militdecideco, kaj ankaŭ la sekvanteco apenaŭ ŝajnas logi iun, ni kredeble ankoraŭ por kelka tempo povos kalkuli kun tio, ke ni vidos la okcidentajn demokratiojn, sub gvidado de iliaj du diktatoroj kiel ĝis nun en plena harmonio konsiligantaj pri starigo de komuna ĉefkomando por la aliancaj armeoj.

Kiam mi antaŭ kelke da tempo interparolis kun neŭtralulo, disponanta pri plej preciza kono de la aferoj, pri anglaj politikistoj kaj ilia miriga nescio pri la kontinento kaj speciale pri Germanujo, tiu saĝa kompetentulo diris, ke plej kapabla por eksterlanda politiko nun sendube estas lordo Robert Cecil. La sinjoro eble estis prava. La filo de lordo Salisbury, kiu de sia infaneco vivadis en la aero de grandaj internaciaj aferoj, eble povis havi kelkan scion ankaŭ pri aferoj ekstere de Anglujo. Sed post kiam la citito kompromitis la anglan registaron per la ridinda kaj nauza afero pri la germana kadavro-utiligo kaj nun en parolado disvastigata de Reuter la laŭdire projektatan leĝdonon por enkonduki la poligamion en Germanujo plene serioze konsiderigis kiel karakterizan por germanaj opinioj kaj aferstato, oni vere devas diri: La mondo estas kompatinda, kiu en siaj plej gravaj interesoj, por kiuj miloj ĉiutage oferas sian vivon, estas gvidata de homoj, tiom plene sensciaj pri la speco kaj esenco de siaj kontraŭuloj kiel la anglaj politikistoj.

Mi devas rezigni, tion aŭ tion pri-trakti pli detale. Nur unu rezonon mi deziras ankoraŭ mencii, ĉar ĝi ofte aperas kaj en la malamika gazetaro kaj de tie ankaŭ transiris en la idearon de kontraŭulaj politikistoj.

Tiurilate, sinjoroj, la klariĝo de la situacio estas salutinda, kiel ĝi okazis ĉe la okcidentaj ŝtatpotencoj sub la premo de niaj plej novaj grandaj sukcesoj. La partianoj de la milito ĝis la fino postulas la venkon kaj nenion krom la venko, kaj kiel ili intencus

ekspuati tiun venkon, pri tio la sekretaj dokumentoj, kies publikigo estas komencita de la rusa registaro, prezentas plej edifan ilustron.

Oni asertas, — ĉu *bona* aŭ *mala fide*, tion mi ne volas ekzameni —, ke Germanujo pri siaj militceloj montras tiom grandan sindetenon, ĉar la afero estas pri bone pripensita trompa manovro. Se Germanujo estos sukcesinta, kunveniĝi la kontraŭulojn ĉirkaŭ la konferenca tablo, Germanujo malkaŝus nekredablajn postulojn, kalkulante, ke la militlacaj popoloj, pretaj eĉ al ampleksaj politikaj oferoj, ne donos al siaj diplomatoj la politikan subtenon necesan por repuŝi la germanajn pretendojn. Ke pro tiu kaŭzo oni devas daŭrigi la bataladon, ĝis Germanujo estos devigita, publike plej detale deklari siajn kondiĉojn.

Kiel mi jam diris, mi ne okupas min pri tiuj stultaj rezonoj, se ili ne estus akceptitaj ankaŭ de malamikaj politikistoj. Se niaj kontraŭuloj havas intereson ekscii, kion ni volas, tio estas eksterorde simpla por ili. Vojoj por tio plene sufiĉe estas disponeblaj, kaj ke ia kunveno de pli granda stilo estas kongresinta, ne antaŭe per konfidencia konsiliĝo atinginte klarecon pri la reciprokaj intencoj, estas okazajo sen ekzemplo en la historio.

Kiam mi havis la honoron, la lastan fojon paroli al vi en la plenkunveno de la Alta Ĉambro, ankoraŭ povis ŝajni dube, ĉu la papa noto estos respondata, ĉu difinitaj, malforte aperintaj de la flanko de niaj okcidentaj kontraŭuloj celadoj al akordiĝo akiras forton kaj influon. Hodiaŭ estas certe, ke la papa manifesto ne estos respondata de la okcidento, kaj ke Francujo kaj Anglujo decidiĝis, apogi sin nur sur perforto. Do la germana popolo ankaŭ interne defendu kaj armu sin, venki perforton per perforto kaj kun forto kaj trankvilo konformaj al la majesteco de la germana nomo batali kaj persisti, ĝis la aŭroro de pli bona kaj pli humana ekkono, kiu nun komencas elkrepuskiĝi en la oriento, ekbrilos ankaŭ en la or- kaj potencavidaj ŝtatoj de l' okcidento.

Eble la publikigita en angla ĵurnalo letero de la influa kaj akirinta riĉan diplomatian spertan lordo Lansdowne, kiu ĝis nun estas alveninta nur en telegrafeltiraĵoj, povas esti komprenata kiel esperiga signo por tio, ke ankaŭ en Anglujo moderaj voĉoj gajnas kreskantan influon.

[N. A. Z. 359]

Imperiestro kaj caro

Telegram-interŝanĝo inter la germana imperiestro kaj la eks-caro de Ruslando en la jaroj 1904—1905

Berlin, en Septembro 1917.

I.

En multjara kalumnia militiro niaj kontraŭuloj por malutilo de Germanujo falsis la senperan antaŭhistorion de l' nuna milito. La regado pri la tutmonda informservo per Anglujo kune kun cenzuro same laŭplane kiel senkonsidere praktikata kondukis al neniam ekzistinta subpremo de la vero. Eĉ al la popoloj, komence ne partoprenintaj la militon, helpe de tiu spirita perfortado estas trudita perfekte erara juĝo pri la vera fariĝo de l' aferoj. Precize tiel, kiel la sanga batalo per la bataliloj, ankaŭ la batalo pro la publika opinio de l' mondo tuj de komenco estis ne egala batalo por Germanujo.

Ĝis nun preskaŭ ŝajnis, kvazaŭ la malamiko, malgraŭ sia superforto sur tero kaj sur maro sensukcesa en ĉiuj decidigaj militejoj, konservus la supercon en sia batalo kontraŭ la morala netuŝebleco de Germanujo. Kun maldolĉa indigno ni vidis, ke la mensogo pri la germana kulpo je la milito pli kaj pli disvastiĝis eĉ tie, kie oni antaŭe sentis afable por ni.

Sed subite la lumo de la historia vero hele kaj klare ekflamis en loko, kiu ĝis antaŭ ne longe kuŝis ankoraŭ en precipe profunda mallumo: en Ruslando.


La tribunala proceso kontraŭ la bruligintoj, kiuj estas kulpaj pri la emocia malfeliĉo de l' rusa popolo,

sklavigita iam de la regado de l' knuto kaj nun de la egoismo de Anglujo kaj Francujo, disŝiris la malsekuran vualon, kiu ĝis nun kovris la lastajn okazintaĵojn antaŭ la eksplodo de l' milito. Montriĝis, kiel la politika encirkligo al Germanujo, realigita iam de Anglujo, pli kaj pli fariĝis la fundo de senpera militincitado. La interna egaleco de l' karaktero de Edward VIIa kaj de la senkonsciencaj, de potencavido kaj havemo plenigitaj ekzekutistoj de la rusa despotismo, disbatita de la milito, klare evidentiĝis. Antaŭ la okuloj de ĉiuj videbliĝis, ke Petersburg-aj krimuloj estis plenumintaj tion, kio iam en London kaj Paris estis zorgeme preparita de malvarmete kalkulanta, per morala malhelpo ne bridata politiko.

Al tio ne kontrastas, sed akordiĝas, ke en Anglujo oni nun provas nei ĉiun kunkulpon. Kiam la origina iniciatinto de lumtimaj agoj konfesis aparteni al tiuj, kiuj makulis sian manon per la malpuro de l' ekzekuto? Kiam ajn lia ruzplena, la konsekvencojn antaŭe pripensanta kapo estis embarasata pro la elturniĝo, kiu forŝovas ĉiun kulpon al la dungitaj plenumintoj?

Sed per ĉi tiuj ĉiutagaj rimedoj oni ne kontentiĝas en la malamika tendaro. La politiko de la ruzegaj lernantoj de Edward kontentiĝas nek en London nek en la konfederitaj kun Anglujo ŝtatoj pri la nura defendo. Kun ne erarigita konsekvenco ĝi firmtenas la per riĉa sperto sin pruvintan principon, ke ankaŭ en la politiko la ekbato estas la plej bona defendo.

La pezo de l' potenca bastonegato, kiun Suĥomlinov kaj lia kunulo Januŝkeviĉ, premegitaj de la juĝisto, direktis kontraŭ siaj iamaj kunribelintoj, restis ja eĉ sur ĉi tiuj majstroj de la mensogo ne sen forta efiko. Ilia kapo komence estis tiel konfuzita, ke ili ekpensis nenion pli bonan, ol mordsilenti la decidigajn eldirojn de la senmaskigitaj militincitintoj.



La vivo sur la Galata-ponto en Konstantinoplo

Sed apenaŭ iom rekonsciiginte, ili jam ĉirkaŭrigardas al novaj atakbataliloj. En la pli nova parto de ilia armilejo ili ne plu trovis ion pli-malpli uzeblan. Vole-nevole ili devis rekapti je malnovigintaj provizoj. Kaj ĉe tio fine venis en iliajn manojn kelkaj depeŝoj, kiuj dum la rusa-japana milito en la jaroj 1904 kaj 1905 estas interŝanĝitaj inter la germana imperiestro kaj la tiama caro de Ruslando.

Evidente estis du ĉefaj konsideroj, pro kiuj oni decidigis, publikigi ĝuste tiujn dokumentojn. Unue la blindā persona malamo, kiu de post la komenco de l' milito instigis la senhontajn, eĉ de la plej malgranda ekmoŭo de l' konveno senigitajn gazetar-agitadojn kontraŭ la germana imperiestro. Kaj due la tute ĝusta kompreno, ke atako, grave endanĝeriganta la konfidon de l' germana popolo al ĝia samgenta estro, trafus la venkfieran defendoforton de l' imperio ĉe ĝia radiko. Kiom krom tio ankaŭ kunefikis la bezono de la malamikaj al ni popoloj je ekscitego al iliaj malfortigintaj nervoj per novaj, de la ekkono de l' vero deturnantaj sensacioj, pri tio ni ne volas paroli.

Ni estas en la feliĉa situacio, ankaŭ posedi la telegraminterŝanĝon, intertempe publikigitan de la kontraŭuloj en ilia senco. Ĝi ne bezonas timi la lumon, ĉar ĝi enhavas nur novajn pruvojn por tio, ke la germana imperiestro frutempe antaŭvidis la al lia popolo jam de multaj jaroj minacantan danĝeron de malamika atako, kaj ke li, plene konsentante kun la respondecaj viroj de la registaro, ĉion uzis, por forigi ĝin.

La teksto de la depeŝoj, kiujn ni represos en la sekvontaj artikoloj, ne refuteble pruvos tion kaj krom tiu ĉi konstato ne estos sen intereso. [250]

II.

Ĉe la eksplodo de l' rusa-japana milito multnombraj firmoj estis aspirintaj pri la liveroj de karboj por la

rusa ŝiparo, precipe por la baltika eskadro. La komisioj fine estis donataj al germanaj ŝipmastroj, kvankam unuavice temis pri ŝiptransporto de anglaj karboj. La kontraktoj estis farataj ne kun la rusa registaro, sed kun privataj firmoj. Ili koncernis nur la transporton de la karboj el angla aŭ kontinenta haveno al destinitaj *neŭtralaj* havenoj.

En Anglujo la negocia envio de la tieaj ŝipveturasocioj senkatenis tumulton de indigno pri tiu, laŭdire la neŭtralecon kontraŭanta konduto de Germanujo. Spite de tio anglaj ŝipoj je la sama tempo alkondukis al la japanoj grandajn karbo-amason kaj transportis ilin ne, kiel la germanaj ŝipoj, nur al neŭtralaj havenoj, sed ĝis Japanujo mem. Multfoje ili transdonis ŝarĝon eĉ senpere al la japana ŝiparo.

Jam tiam, precize kiel hodiaŭ, oni opiniis en London, ke la libereco de l' maroj estas valida nur por Anglujo. Sekve de tio oni klopodis timigi Germanujon. La gazetaro eldiris minacojn. Lordo Lansdowne koncize deklaris al la germana ambasadoro, ke, se Japanujo pro la laŭdira neŭtraleca difekto de Germanujo vidus sin instigata al milito kontraŭ ni, Anglujo laŭ japana petpostulo konsiderus ekzistanta la kazon de ligodevo. La angla registaro eĉ arogis al si, germanajn vaporŝipojn, ŝarĝantajn karbojn en anglaj havenoj, malhelpi elveturi, kaj ĝi motivis tion per la preteksto, ke la devo de neŭtraleco tion postulas.

En Japanujo, fariĝinta malhumila pro siaj venkoj, oni minacis ĉiujn neŭtralulojn, kiuj liveris karbojn al la kontraŭuloj, tute malkaŝe per milita procedo.

Ekzistis do la senpera danĝero, ke Germanujo, se ĝi per tiuj provoj de entimigo ne volis lasi sin fortimigi de la plenumado de sia netuŝebla rajto pri transmara komerca libereco, estos implikata kun Anglujo kaj Japanujo en militon elvokitan de ĉi tiuj ŝtatspotencoj.

En tiuj cirkonstancoj estis laŭnature kaj kompreneble per si mem, ke Germanujo serĉis apogon ĉe Ruslando, tre grave kuntuŝita de la konservo de ĝia rajto. Tio okazis la 27-an de Oktobro 1904 per la jena, al la proponoj de l' ministerio por eksteraj aferoj konforma depeŝo de l' imperiestro al la rusa caro:

De sufiĉe longa tempo la angla gazetaro minacas Germanujon, por ke ĝi neniukondiĉe permesu, ke karboj estu sendataj al via baltika eskadro, kiu nun estas elvojaĝanta. Ne estas ne eble, ke la japana kaj la angla registaroj komune protestos kontraŭ nia provizado al viaj ŝipoj per karboj kaj postulos, ĉesigi ĉiun pluan agadon. La per tia militminaco celata rezulto estus, ke via ŝiparo estos plene haltigata kaj ke per manko de karboj estos malebligite al ĝi, atingi sian celon. Tiun ĉi novan danĝeron Ruslando kaj Germanujo devus komune renkonti. Vian konfederiton Francujo ili ĉe tio devus memori pri la sindevigoj, kiujn ĝi prenis sur sin en la du-alianza kontrakto kun vi, pri la *casus foederis*. Estas ne eble, ke Francujo konsidere al tia alvoko provus eviti sian memkompreneblan devon kontraŭ sia konfederito. Kvankam Delcassé estas laŭjura anglo-amiko, li tamen estas sufiĉe prudenta por kompreni, ke la angla ŝiparo estas tute ne kapabla, ŝirmi Paris-on. Tiamaniere ekestus potenca kunigo de la tri plej fortaj kontinentaj ŝtatspotencoj, kiun ataki la angla-japana grupo dufoje pripensus.

La plendoj de Anglujo pro nia karboprovizado por rusaj ŝipoj estas tiom malpli pravigitaj, ke Anglujo de post la komenco de l' milito — post kiam ĝi donacis al Japanujo du kirasŝipojn „Nislim“ kaj „Kasuga“ kun anglaj oficiroj kaj anaroj — per siaj karboj konstante provizis la japanan ŝiparon kaj vendis al Japanujo ne malpli ol 30 vaporŝipojn. La marbataloj, kiujn Togo liveras, estas farataj per Cardiff-karboj. Kompreneble estus multe pli agrable por ni, se la angloj estus sufiĉe prudentaj, konsideri ĉion ĉi tion kaj lasi nin solaj kaj en paco. Sed neniam mi cedos eĉ unu momenton al minaco ne pravigita.

Mi bedaŭras la akcidenton en la Norda Maro. Se la ŝiparo timas dumnoktajn atakojn, laŭ mia opinio lumjetiloj sole sufiĉus, por gardi la ŝipojn kontraŭ sur-

prizo, se ĉiuj sektoroj, kuŝantaj ekster la eskadro, estus lumigataj. Sed la uzado de paflegoj devus — precipe en eŭropaj akvaroj — kiel eble plej multe esti lumigata. Miaj informoj el London diras, ke la gazetaro kaj la stratpubliko bruas, ke la admiralitato iom ekscitiĝas, sed ke registaro, kortego kaj societo kun granda trankvilo konsideras la okazintaĵon bedaŭrinda akcidento fariĝinta pro tro granda nervozeco.

Mi havas certajn sciigojn el Italujo, ke la Terni-ŝipkonstru-trusto (Terni, Otero, Orlando) estas konstruanta tri rapide veturantajn transmaraĵn kirasŝipojn de po 12000 tunoj por fremda, ne nomita ŝtatspotenco, verŝajne Japanujo. Ĉi tio memorigas min pri mia antaŭa propono, ke vi ne forgesu, ankaŭ mendi novajn militŝipojn, por havi kelkajn pretajn, kiam la milito estos finiĝinta. Ili havos bonegan konvinkoforton dum la pacintertraktoj. Niaj privataj firmoj tre ĝojus, ricevi komisionojn.

Mi aligis Lambsdorff-on al via sekvantaro, same kiel vi afable faris tion por mi rilate al Ŝebeko. Mi estas tre danka pro via afabla aprobo de mia konduto kontraŭ vi kaj Ruslando kaj certigas al vi, ke vi ĉiam povas fidi pri mia senkondiĉa kaj fidela lojaleco.

Plej bonajn salutojn al Aliko.

La 29-an de Oktobro 1904 la caro sendis al la imperiestro la jenan telegram-respondon:

Via telegramo alvenas en tre serioza momento. Kompreneble vi konas la unuajn detalojn de la nordmara epizodo el la telegramo de nia admiralato. Tio ĉi kompreneble perfekte ŝanĝas la karakteron de l' okazintaĵo. Mi ne havas parolojn, por esprimi mian indignon pri la konduto de Anglujo. Ŝajnas, ke la kontinentaj ŝtatspotencoj en similaj okazoj endanĝerigas, ke la publika opinio de Anglujo subigas pli prudentan sintenadon de la registaro. Ĉi tiu devas obei ĝin. La ministroj de la lando entreprenas riskajn paŝojn kaj sendas impertinentajn notojn kun tute ne akcepteblaj kondiĉoj. Tio estas la sekvo de tio, ke oni agas laŭ la inspiro de l' unua momento! Hodiaŭ mi ordonis al Lambsdorff, sendi al mia London-a ambasadoro la proponon, submeti la tutan problemon al internacia esplorkomisiono, kiel tio estas fiksita en la protokolo de l' Haag-a konferenco. Mi tute

konsentas viajn plendojn pri la konduto de Anglujo koncerne la karbo-provizadon al niaj ŝipoj per germanaj vaporŝipoj, dum ĝi scias fari difinojn, konservi la neŭtralecon en sia propra maniero. Certe estas urĝa tempo, tion ĉesigi. La sola rimedo estus, kiel vi diras, ke Germanujo, Ruslando kaj Francujo tuj interkompreniĝu pri interkonsento, por neniigi la anglan-japanan arogantecon kaj impertinentecon. Bonvolu skizi, verki kaj al mi seigi la konturojn de tia interkonsento. Tuj kiam ĝi estos akceptita de ni, Francujo estos devigata, aliĝi al sia konfederito. Tiu ĉi kuniĝo ofte estis en miaj pensoj. Ĝi signifas la pacon kaj trankvilon de l' mondo.

Plej bonajn salutojn de Aliks.

Kiel ni jam diris, la ĉi-supra telegraminterŝanĝo estis senpere kaŭzita per elvokanta, neniukonsidere pravigita militminaco de Anglujo kaj Japanujo al Germanujo.

La teksto de l' depeŝo de la imperiestro montras, ke ĝia sendinto nek malkaŝe nek nur alude aspiris plion ol la sekurigon al Germanujo kontraŭ atako ne motivita. Kaj la respondo de l' caro konfirmas, ke ankaŭ la ricevinto nenion alian legis el la depeŝo de l' imperiestro. Nur al la malbona konscienco de niaj malamikoj restis rezervite, dek-tri jarojn poste dum la mondmilito, kiun ĝi estu malebligonta, aliĝi ĝin laŭ maniero celanta ĝian plilongigon. [251 1]

III.

Al la entenata en la respondo de l' caro de la 9-a de Oktobro 1904 propono pri germana-rusa defenda interkonsento aliĝis iom longa skribinterŝanĝo. Parte la monarĥoj mem faris ĝin, parte ĝi estis perata de la organoj de l' registaroj. Ĝi daŭris ĝis Decembro. Ĝia finiĝo estis notinterŝanĝo inter la germana ambasadoro en St. Petersburg, grafo von Alvensleben, kaj la rusa ministro por eksteraj aferoj, grafo Lambsdorff.

La germana noto havis jenan tekston:

St. Petersburg, la ^{28 an de Novembro} 1904.
la ^{11 an de Decembro}

La lastaj aranĝoj de la angla registaro, per kiuj la vaporŝipoj, enŝarĝintaj karbojn en anglaj havenoj, estas malhelpitaj, elveturi kun sia ŝarĝo, klare kaj evidente montras, ke la agadon, kiun plenumas la komerc-ŝipoj de la neŭtralaj ŝtatpotencoj, provizante per karboj la baltikan ŝiparon, Anglujo konsideras kaj pritraktas kiel difekton al la neŭtraleco.

La 15-an de Aŭgusto nunjara lordo Lansdowne deklaris al la ambasadoro de Lia Majesto la imperiestro en London, ke, se Japanujo okaze de difektoj al la neŭtraleco flanke de Germanujo ekprenus la batalilojn, Anglujo laŭ peto de la japana registaro konsiderus la ligokazon donita.

Aliflanke la japana registaro igas deklaris per la oficiala gazetaro, ke ĝi kontraŭ agoj, kiuj laŭ ĝia opinio estas difektoj al la neŭtraleco flanke de fremda ŝtatpotenco, apelacios al la perforto, kaj ke ĝi ne plu respektos la neŭtralecon de tiu ĉi ŝtatpotenco.

El tio ĉi rezultas, ke konflikto kun la du koncernaj ŝtatpotencoj, Anglujo kaj Japanujo, minacas al Germanujo. La imperiestra registaro tial vidas sin devigata, prezenti al la imperiestra rusa registaro la demandon, ĉu ĝi sindevige promesas, helpi Germanujon per ĉiuj rimedoj, pri kiuj ĝi disponas, en ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj povus ekesti sekve de liverado de karboj al la rusa ŝiparo dum la nuna milito.


Se ne estus eble al la imperiestra rusa registaro, doni al la imperiestra registaro tiusecan certigon, la germana registaro vidus sin devigata, rilate al la provizado de karboj senprokraste fari la aranĝojn, kiujn la sekureco de l' imperio postulas.

La imperiestra registaro devos senprokraste efektiviĝi tiujn aranĝojn, se en la tempo de l' alveno de la ŝiparo de admiralo Roŝdestvenski en Madagaskar la koncerna certigo ne estus veninta al la germana registaro.

La rusa responda noto tekstas jene:

St. Petersburg, la ^{29 an de Novembro} 1904.
la ^{12 an de Decembro}

Mi ne preterlasis, prezenti al Lia Majesto la imperiestro la enhavon de la tre konfidenciaj notoj, kiujn Via Ekscelenco hieraŭ transdonis al mi, kaj precipe ankaŭ vian



Germana kavalerio marŝanta antaŭen tra Tolmejno

sciigon pri tio, ke „la imperiestra germana registaro vidas sin devigata, prezenti al la imperiestra rusa registaro la demandon, ĉu ĝi sindevige promesas, helpi Germanujon per ĉiuj rimedoj, pri kiuj ĝi disponas, en ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj povus ekesti sekve de liverado de karboj al la rusa ŝiparo dum la nuna milito“.

Mia majesta regnestro favorege ordonis al mi, respondi al Via Ekscelenco tiun demandon en jesa senco kaj peti Vian Ekscelencan, bonvole transdoni al via registaro la formalan certigon, ke la rusa registaro estas decidiginta, rilate al la demando pri la liverado de karboj plene aliri al la flanko de la imperiestra germana registaro en la firma konvinko, ke tiu ĉi siaflanke, kiel Via Ekscelenco tion hieraŭ certigis al mi, daŭrigos la amikan sintenadon, kiun ĝi ĝis nun montris, kaj plifaciligos la liveron de karboj al la rusa ŝiparo. Tiu ĉi reciproka garantio de la du najbaraj kaj amikaj imperioj, kiel mi esperas, helpos por ilia plena interkonsento, kiu en la nuna situacio estas tiom grava kaj dezirinda por iliaj reciprokaj interesoj.

Laŭ plej alta ordono transdonante al vi la ĉi-supran deklaron, mi uzas ĉi tiun okazon, renovigi al vi, sinjoro ambasadoro, la certigon pri mia precipa altestimo.

subskr. *Lambsdorff*.

Por la daŭro de l' rusa-japana milito helpe de ĉi tiuj interkonsentoj estis atingita efika ŝirmo al la minacataj germanaj interesoj.

Sed la konduto de Granda Britio, interesita pri la venko de Japanujo kontraŭ Rusujo, tute ne konsiderite la gravecon de l' priskribita unuopa kazo, ankaŭ ĝenerale politike havis la plej grandan signifon. Ĝi malfermis perspektivon al tio, kiel Anglujo ankaŭ en postaj krizaj situacioj, ne zorgante pro la justeco, interpretus pro sia profito la komprenon pri neŭtraleco kaj pri libereco de la maroj. Ĝi samtempe montris, ke Anglujo — kion la mondmilito ja intertempe certigis — eĉ ne unu momenton hezitus, helpe de tiu brita elmontro, senkonsidere fuŝuzante sian superfortan ŝiparon kaj aliajn premilojn, perforti fremdan rajton.

Kontraŭe al tio singardo kaj gardo demo estis necesaj. Germanujo tial en la sekvanta tempo klopodis, ne lasi denove deŝiri la ekŝpinitan fadenon de interkompreniĝo kun Ruslando, servanta al la ŝirmo de la vivogravaj interesoj de l' imperio. Grava etapo sur la vojo suririta per tio estis la kunveno de l' imperiestro kun la caro en Björkoe, kiu efektiviĝis la 24an de Julio 1905.

Pri la politika signifo de tiu ĉi kunveno ni parolos en la sekvanta artikolo. (Finota) [252 III]

La imperiestraj manskribaĵoj al la pola vicregnestra konsilantaro

La pola vicregnestra konsilantaro kaŭze de la surprono de sia ofico direktis la sekvantan skribaĵon al Lia Majesto la Imperiestro:

Varŝava, la 27an de Oktobro 1917.

Imperiestra kaj Reĝa Majesto!

Per la manskribaĵo de Via Majesto de la 14a de Oktobro 1917 rekonite kiel membroj de la kreita per la patento de la 12a de Septembro 1917 vicregnestra konsilantaro de la pola ŝtato, ni sciigas al Via Majesto, ke ni komencas plenumi la plej superan ŝtataŭtoritaton.

En la reĝa katedralo de Sankta Johano ni faris la solenan ĵuron, ke ni aplikos nian regaŭtoritaton por la bono de ĉiuj, por firme bazi la sendependon, la potencon, la gloron, la liberon kaj la feliĉon de nia pola hejmlando, por konservi la pacon kaj konkordon inter ĉiuj civitanoj de la lando, metante la ĝeneralan bonon super la propran vivon kaj la personan intereson. Ni promesis, demeti nian oficon en la manojn de reĝo aŭ vicregnestro de la pola ŝtato.

Ni volas konduki la polan popolon renkonte al ĝia ŝtata sendependado sur la bazo de la aktoj dekretitaj de Via Majesto en la memorindaj tagoj de la 5a de Novembro 1916 kaj 12a de Septembro 1917. Sur tiun fundamenton ni starigas kun la sama lojalo, kiu estas inda de la seriozo kaj la

grando de la historia momento, de la honoro de la pola popolo.

Kiel membroj de la vicregnestra konsilantaro ni deklaras, ke la konsekvencoj logike rezultantaj el tiuj aktoj estas decidigaj por nia politika poziciigo.

Kiel vicregnestra konsilantaro de la fariĝanta sendependa pola ŝtato kaj komisiitaj reprezentantoj de la pola popolo ni prezentas al Via Majesto la esprimon de respekto kaj profunda dankemo pro la akto de la 5a de Novembro 1916 kaj la patento de la 12a de Septembro 1917.

Ni speciale salutas la bonvolajn ideojn kaj intencojn, kiujn Via Majesto esprimis en la Plej Favora Manskribaĵo de la 12a de Septembro 1917.

Ni atendas, ke la pola popolo en la plua evoluo de la historiaj okazaĵoj, apogite sur sia propra militistaro kaj sekvante siajn proprajn interesojn sur la bazo de la ligilo de la komuna okcidenta kulturo, aspiros kun la du centraj ŝtatpotencoj komunajn politikajn kaj ekonomiajn celojn.

Ni uzas ankaŭ ĉi tiun okazon, por peti la ŝirmon de Dio por Via Majesto kaj ni.

*Aleksandro Kakovski, ĉefepiskopo
Princo Ladislao Lubomirski
Jozefo de Ostrovski*

Lia Majesto al tio respondis en la sekvanta Plej Favora Manskribaĵo:

Granda Ĉefstabejo, 17. 11. 1917.

Al la alta vicregnestra konsilantaro de la reĝlando Polujo!

Kun sincera kontento Mi eksciis la enhavon de la manskribaĵo, per kiu la pola vicregnestra konsilantaro anoncis al Mi sian ekfunkcion.

La voĉo de la pola nacio kvalifikis Vin, altaj sinjoroj, kiel la plej destinindajn portontojn de la plej supera rango en la nova pola ŝtato, kaj volonte Mia Moŝta Ligano kaj Mi laŭ propono de la transira komisiono de la provizora ŝtata konsilantaro plenumis Vian nomadon al vicregnestroj de la reĝlando Polujo.

La deklarojn, kiujn Vi prezentis en Via skribaĵo al Mi, pravas, ke Vi plene konscias la grandajn devojn kaj taskojn, kiujn Polujo postulas de la

unuaj portantoj de ĝia ŝtataŭtoritato. Ne malpli Vi klare ekkonis kaj ne dubeble formulis la neceson, ke Polujo devas esti plukonstruata sur la fundamento, sur kiu ĝi estis nove fondata, montrante la aktojn de la 5a de Novembro 1916 kaj 12a de Septembro 1917 kiel la fundamenton de Via plua agado. Al Via solena deklaro pri fidelo al tiuj signifaj ŝtataktaj Mi sentas plenan konfidon kaj scias, ke la alta vicregnestra konsilantaro ĉiam restos fidela al la gvidlinioj, kiujn li mem skizis en sia skribaĵo al Mi. Mi samopinias kun Vi, ke sur la bazo de la aliĝo al la centraj ŝtatpotencoj ekzistas la vivkondiĉoj, kiuj garantias al la pola ŝtato riĉan floradon kaj al ĝiaj civitanoj la bonfarojn de paco, kulturo kaj bonstato, kaj Mi havas la fidon, ke Polujo estas destinita, en libera, mem elektita ligo kun la potencaj najbaraj ŝtatoj eniri en novan periodon de ŝtata grandeco kaj per tio esti grava faktoro por la evoluo de Eŭropo en la senco de la okcidentlandaj kulturidealoj.

Tial Mi do kore bonvenigas Vin en Via nova ofico kaj deziras al Vi sukcesan laboradon por labono de la renaskiĝinta pola nacio. La beno de la Ĉiopovulo ripozu sur Via agado. *Wilhelm I. R.*

Sama korespondo okazis inter la pola vicregnestra konsilantaro kaj Lia Majesto Imperiestro Karlo. [Keh. XI/17]

Jus aperis:

Nova Esperanto-Biblioteko

No 2 — Prezo 30 Pf. (afrankite)

Enhavo:

La efikoj de la U-boata milito

laŭ oficialaj elmontroj en komenco de Aŭgusto 1917

Eldonita de

Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto-Servo)

Havebla ĉe

Friedrich Ellersiek, Esperanto-Verlag
Berlin S 59



La investituro de la pola vicregnestra konsilantaro en Varŝava (27a de Oktobro 1917)
La vicregnestra konsilantaro solene iras al la jurigo. De maldekstre al dekstre: S-ro de Ostrovski, ĉefepiskopo Kakovski kaj princo Lubomirski en la procesio.

La germana imperiestro en la batalo por la mondopaco

La eldiroj de la iama rusa militministro Suhomlinov kaj de lia iama ĉefstabestro Januŝkevits restarigis antaŭ Eŭropo la figuron de la germana pacimperiestro, kun la nebulo de malamikaj mensogoj vane provis mallumigi. La monarĥa idealo estas prezentata en tiu ĉi bildo; ĉar en la 26 feliĉaj jaroj de lia regado lia celo estis tiu: doni al la mondo la ekzemplon de reganto, kiu sukcesis, ne malzorgante la virforton de sia popolo, pace gvidi nacion troviĝantan en grandega ekonomia evoluo tra mondo plena de malfacilaj problemoj. Tiun ĉi sencon havis la promesoj de la „belegaj tagoj“, pri kiuj li parolis je la komenco de sia regado. Nun la eldiroj de la du rusaj oficiroj, devenantaj el plej intima politika, eĉ pli ol politika, el senpera militista kono de la okazaĵoj akompanintaj la eksplodon de la mondmilito, atestas al li, ke ankaŭ en tiu fatala horo de Eŭropo estis *li*, kiu per ĉiuj rimedoj provis konservi la mondopacon.

Estas preskaŭ tragike, ke la du generaloj tiamaniere devis atesti kontraŭ la propra reganto kaj por la malamika monarĥo. Du historiajn personojn ni vidas fiksitaj en tiuj ĉi atestoj, kaj samtempe du homajn karakterojn: jen la caron, kiu iam kunvokis la Haag-an konferencon por fondi mondopacon, kaj kiu, nun senhelpa, ne scias, kiel li konfesas mem en sia tria depeŝo, kontraŭstari al la premo de la militpartio, kaj jen la imperiestron, kiu ĉiam estis pacamiko kaj samtempe energiulo, kiu nun per la sama volo, kiun li ĉiam uzis por la konservo de la paco, kontraŭbatalas la sorton minacantan Eŭropon. La du oficiroj per siaj eldiroj, kies politikan gravecon ili certe ne konsciis, decidis gravan demandon, kies prirespondo estas ligita al la personoj de la du regantoj, la demandon pri la kulpo je la milito.

Por la germana popolo tiu ĉi demando ja jam de longe estis solvita. La germana popolo *antaŭ* la milito konis la pacamon de sia imperiestro, ĝi kredis kaj fidis al ĝi. Kaj kiam la milito eksplodis, ĝi prenis ĝin sur sin, konsciiga, ke, se *iu* homo ĉion faris, por ĝin eviti, ĉi tiu unu homo estis la germana imperiestro. Tiu konscio donis al ni la sanktan konvinkon, ke la rajto en la milito estas je nia flanko, kaj ankaŭ kiel simbolon por tiu ĉi konvinko ni rigardas la personon de la imperiestro. Tiel nia popolo iris en la militon, kaj ĝia unueco estis nur esprimo de ĝia konscio, esti prava, por kiu la imperiestro estis al ĝi garantiinto, kaj kiun ĝi vidis korpiginta en la imperiestro.

Sed al la neŭtralaj popoloj, se ili ankoraŭ dubis, la atesto de la du oficiroj malfermos la okulojn. Post la tuto da mensogoj, kiu dum la milito falsigis faktojn kaj personojn, ili reĝustigos la karikaturan opinion pri la imperiestro kaj vidos la rajton ligita kun lia afero. Plue, kun la nehaltigebleco, per kiu la vero fine ĉiam venkas, eĉ se ĝi uzas tiajn ne antaŭviditajn epizodojn de la mondhistorio, kia estas tiu Petersburg-a tribunalproceso, ĝi penetros eĉ ĝis la malamikaj popoloj. Per tio ili nur revenus al la opinio, kiun ili reale ĉiam havis pri Wilhelm IIa. La juĝo pri li certe ŝanceliĝis strange, precipe en Francujo, kie oni pleje okupiĝis pri lia personeco. Sed la ŝanĝo de la prijuĝo havis sian kaŭzon ne en la imperiestro, sed baziĝis sur la ŝanĝiĝantaj politikaj animstatoj kaj celadoj, en la propra politika bezono, klarigi la personecon de la imperiestro laŭ tiu aŭ tiu maniero. Kaj, kiel multaj atestantoj pruvas, en la animstatoj de la popoloj ĉiam ekzistis la fundamenta kompreno, ke la pacvolo de la imperiestro ne estas dubebla. Sed kiam la katastrofo estis ekiĝinta, kiam la mondmilito estis senkatengita, tiam oni re-

elprenis la antaŭajn signovortojn, kaj unu superis la alian, elmontrante la germanan reganton kiel „Attila-on“, kiu pro nura mortigemo kaj krueleco volas dronigi la homaron en maro da sango.

Kiel malĝusta kaj ridinda estas tiu ĉi groteska karikaturo, tio neniel pli evidentiĝas ol per la eldiroj de la atestanto kaj de la kulpigito antaŭ la Petersburg-a tribunalo. La batalo de la imperiestro pro la paco, kiu en liaj depeŝoj al la caro prezentas sin tiel kortuŝe, ricevas nur nun la realan tonon, kiun la rusaj oficialaj publikigoj ĝis nun kaŝis. Liaj virecaj kaj energiaj paroloj komence ne malimpresis la eks-caron. Kiam Wilhelm IIa en la nokto inter la 29a kaj la 30a de julio depeŝis al la caro, ke li povos gvidi sian rolon kiel peranto ĝis la fino nur, se Ruslando ne mobilizos, tiam la caro volis plenumi lian postulon; sed la influo de liaj servantoj estis pli forta ol lia propra. Ili malatentis liajn ekspresajn ordonojn kaj aranĝis la mobilizon kontraŭ lia volo. „La tuta pezo de la decido estas nun sur Viaj ŝultroj; ili portas la respondecon pri milito kaj paco“, la imperiestro en la nokto inter la 29a kaj la 30a de julio estis depeŝinta al la caro. Sed la caro estis tro malforta por porti tiun ŝarĝon; li fariĝis ilo en la manoj de tiuj malkonsciencaj milit-incidentoj, kiuj per la konfeso de sia kulpo mem sin brulstampis. Kaj tial estis sensukcese, ke la imperiestro el sia propra profunda sento pri respondeco telegrafis jam la 31an de julio: „Ne mi havas la respondecon pri la malfeliĉo, kiu nun minacas al la tuta civilizita mondo. Ankoraŭ en tiu ĉi momento estas ĉe Vi, ĝin deturni. Neniu minacas la honoron kaj la potencon de Ruslando, kiu certe estus povinta atendi la sukceson de mia perado. La amikeco por Vi kaj Via regno, konfidita al mi de mia mortinta avo, ĉiam estis sankta al mi, kaj mi konservis mian fidelecon al Rus-

lando, kiam ĝi estis grave endanĝerigita, precipe en ĝia lasta milito. La paco de Eŭropo ankoraŭ nun povas esti savata de Vi, se Ruslando sin decidis, haltigi siajn militajn preparojn, kiuj minacas Germanujon kaj Aŭstrio-Hungarujon.“ Sed Suhomlinov kaj Januŝkeviĉ tiam jam de longe estis ordonintaj la mobilizon.

La psikologio de la germana pacamo kaj de ĝia imperiestra reprezentanto neniam estis komprenata en la Entente-landoj. Oni tie ne havis tion, sur kio ĝi baziĝis, la respondecon. Tio estas sento fremda por nacioj, kiuj kutimas pensi ĉiam nur pri la gloro aŭ pri sia propra profito. La imperiestro staris antaŭ la malfacila problemo, devi certigi la evoluon al nacio kaj voli ĝin certigi al ĝi per paco, ne per milito. Li firme restis ĉe tiu volo ĝis la lasta momento, en kiu la rusa mobilizado igis lin konfesi al lia popolo: „Oni devigas al ni la glavon en la manon.“ La vereco de ĉi tiu eldiro nun estas dokumentita per la konfeso de la du rusaj ĉefkomandantoj, kiuj mensogis al la caro kaj tiamaniere lin igis mensogi al la imperiestro. La senrespondeco de tiuj du oficiroj eksplodigis la militon, el kiuj unu tiam donis sian honorvorton, ke Ruslando ne mobilizas, kvankam li portis la mobilizan ordonon en la poŝo. Tiu ĉi fakto estas tiel fiksa kiel tiu alia, ke tiam la franca militministro, por forŝovi de Francujo la respondecon pri la unua milito-deklaro, eldiris la jenon: „Unu horon post vi, sinjoroj germanoj!“ Pro la sama sento pri respondeco, kiun la imperiestro dokumentis ĉe la milit-eksplodo, li pli malfrue irigis en la mondon la pacproponon, kiel reganto, „kiu — kiel li esprimis tion en la konata letero al la germanimperier kanceliero — havas koron por siaj kaj la malamikaj homoj, kiu, ne konsiderante la eventualajn intencajn misinterpretojn de sia paŝo, havas la

volon, liberigi la mondon de ĝiaj suferoj.“ La kulpon pri la plilongigo de la milito hodiaŭ portas Entente, kiu rifuzis la pacproponon. Sed la kulpo pri la senpera eksplodo de la milito refalas sur Ruslandon. Kaj Ruslando verŝajne devos pagi la prezon de tiu kulpo. [D. K. 131]

Milito kaj militado

La militaj okazintaĵoj en la tempo de l' 15a de Oktobro 1917 ĝis la 15a de Novembro 1917

Post kiam la orienta fronto militiste estas kvazaŭ foriĝinta kaj sur la alia fronto nenio grava okazis, la intereso restas limigata je la ĉefa batalfronto de l' okcidento kaj je la itala militejo antaŭ ne longe pligraviginta.

Sur la lasta en la pasinta tempo-daŭro denove estas liverita farajo, pri kiu oni ne scias, ĉu pli admiru la kuraĝon aŭ la forton aŭ la multon da spirito aŭ la zorgemon de ĝia preparo. Senekzempla en la milita historio estas la spirito, kiu elpensis ĉi tiun projekton de trarompo, senekzempla la decidemo de la estraro kaj la venkema ataka spirito de la trupoj. Jam la unua alkuro je la 24a de Oktobro okazigis la trarompon de la tuta itala pozicia reto en larĝo de 30 kilometroj senpere norde de la Bainsizza-altebenajo, kiun la italoj en la 11a Isonzo-batalo akiris per tiel senfinaj oferaĵoj, en la nordo de Goerz. Jam la 25an la atako disvastiĝis je 50 kilometroj, konkeris la 27an la urbon Goerz kaj atingis la ebenajon ĝis la maro. La 28an ankaŭ la fronto en Karintio komencis ŝanceliĝi, la sekvantan tagon la ĝisnuna itala ĉefstabejo Udine venis en la manon de la venkinto, kaj la 4an de Novembro la tre forta itala kontraŭstaro ĉe la Tagliamento estis superata. La 5an de Novembro la italoj devis malokupi la tutan riverlinion en larĝo de 150 kilometroj. Poste la atako transpaŝis la riveron Livenza, konkeris la 9an

kune kun la samtempe de el nordo malsupren irantaj montar-trupoj la fortikajon Asiago kaj atingis la riveron Piave de la Sugana-valo ĝis la maro. La 10an Belluno kapitulacis, la 13an Primolano kaj Feltre. Tiamaniere en la lasta tago de la kvarsemajna daŭro la samliganoj ankoraŭ ĉiam estis en ne haltigita duoble-flanka antaŭenmarŝo kontraŭ la konstante malplilongiganta defenda linio de l' malamiko iom post iom ree kuniĝinta.

La perdoj de la italoj je strategia teritorio, vivaj fortoj kaj materialo jam post malmultaj tagoj estis tiel grandegaj, ke eĉ la eventuala amerika same kiel la urĝe postulita angla-franca helpo jam pligrandparte ŝajnas egaligita. Ĉe tio ni tute silentu pri tio, ke la posteulo de l' eksigita generalissimo Cadorna, generalo Diaz, unue havos la taskon, nove organizi tri armeojn, freŝe aranĝi multajn brigadojn, nove grupigi la paflegaron de la tuta armeo kaj redoni al la trupoj tiun batalemon, sen kiu eĉ la plej bone ekipita trupo ne rajtas esperi sukceson. Tio ĉi estas treege malfacila tasko, kaj restas la demando, ĉu ĝi estas efektivegebla sen lasado de plua teritorio al la energie postpremeganta malamiko. Ĉiukaze tie ĉi en Italujo — kiel jam ofte en la nuna milito — la supereco de la germana gvidado kaj la spirito de la interligitaj trupoj ĉefe kaŭzis la sukceson.

En Flandrujo al la grandaj organizitaj bataloj de antaŭaj monatoj ĉi-foje sekvis nur seninterrompa serio da grandbatalaj tagoj, nome la 22an, 26an kaj 30an de Oktobro kaj la 6an kaj 11an de Novembro. La malnova atakcelo disiĝis en unuopajoj, en sia tuteco ĝi disvastigu la Yperkurbajon kaj konduku al la konkero de la flandra U-boata bazo. La daŭrigataj streĉadoj de la angloj pruvas iliajn ĝisnunajn malsukcesojn. La kelkloka akiro de kelkcentoj da metroj ne povas ŝanĝi tion. Ĉiutage la angloj streĉas la potencon mekanismon de sia militmaŝino direktita al mehanika efiko. La germana armeostraro restas ĉe la elasta kontraŭbatalo, kiu ja faras grandajn postulojn al la defendanto,

sed ĝis nun pruvis sin efika. Kie la situacio tion postulas, ĝi renkontis la alkuregon ankaŭ per agada kontraŭarango. Ekzemple ĉe Chemin des Dames. Tie la proksimume de mezo de Septembro daŭre pliigita franca artileria preparo la 23an de Oktobro rezultigis inter Vauxaillon kaj Faissy, do en larĝo de 25 kilometroj, la grandan atakon, kiu kiel paralela agado estis maturigonta al la anglaj entreprenoj en Flandrujo la ekskuon de la tuta germana fronto, ekprenonte la lastan ĉe dua punkto kaj dispecigonte ĝin per double-flanka premo. Sed la germana armeestfaro, kiel jam tiel ofte sur la okcidenta fronto, ankaŭ tie lerte cedis al la puŝo, lasis al la kontraŭulo kelke da teritorio sur lia maldekstra alo, por poste en bone preparita linio, trans la Ailettevalo, denove fari la malnovan kontraŭstaron, kontraŭ kiu li de tiam vane alkuregas. La perdo de kelke da pafilega materialo ĉe tio laŭnature ne estis evitebla. Sur la cetera atakfronto la francoj spite de plej granda enbataligo ne havis sukcesojn. [Kch. XI.17]

390 500 kaptitoj, 45 550 kvadratkilometroj, 3 233 pafilegoj!

Berlin, 17. 11. 1917. En kvar monatoj preskaŭ 400 000 kaptitoj! Al la grandega akiro de teritorio de pli ol 45 550 kvadratkilometroj, kiujn la samliganoj konkeris en kvar mallongaj monatoj, de mezo de Julio ĝis mezo de Novembro, aliĝas ankoraŭ la grandegaj nombroj da kaptitoj kaj pafilegoj, kiujn sole la pli grandaj agadoj de tiu ĉi tempodaŭro havigis al ni. De la 19a de Julio ĝis mezo de Novembro ĉirkaŭ 390 500 kaptitoj estis farataj kaj pli ol 3 233 pafilegoj konkerataj. Ĉe tio ne estas kunkalkulitaj la pli-malpli grandaj nombroj da kaptitoj, kiuj en la daŭraj bataloj ĉe ĉiuj frontoj alvenas preskaŭ ĉiutage. La dum tiu ĉi tempo krom tio militakirita materialo da maŝinpafiloj, minjetoj kaj alia militilaro ĝis nun eĉ ne proksimume estas transvidebla. La sangaj perdoj de la angloj, francoj, italoj kaj rusoj dum ĉi tiuj monatoj estas

Bonvolu atenti la redakcian informon sur paĝo 26

konforme grandaj. Antaŭ ĉio la kanadanoj kaj angloj dum siaj 14 bataloj pro la U-boata bazo en Flandrujo suferis ne aŭdite sangajn perdojn, kiuj pligrandigis ankoraŭ per la preskaŭ ĉiutagaj sensukcesaj partatakoj. [Kch. XI.17]

8047 000 tunoj surfundigitaj

Berlin, 11. 12. 1917.

La jarbilanco de la submarboata milito, kies pliakrigo estis la germana respondo al la sarkasme rifuzita paĉpropono de l' 12a de Decembro 1916, akre kontrastas la komencan optimismon de la Entente-registaroj. El tutmonda tunajo de ankoraŭ ne 50 milionoj da kuntaraj registrotunoj pli ol kvarono estas surfundigita, el tio sole en la 10 monatoj de l' 1a de Januaro ĝis la 31a de Oktobro 8047 000 kuntaraj registrotunoj. Se oni kalkulas la valoron de unu tuno nur je 1000 Markoj, en tiu mallonga periodo rezultas perdo de 8047 000 000 Markoj. Por kompensi la perdon, Entente povis disponi pri novkonstruoj, elpremo de neŭtrala ŝipvolmeno kaj konfisko al germanaj ŝipoj. La germanaj ŝipoprovizoj en antaŭe neŭtralaj manoj estas elĉerpitaj, kaj la elpremo de neŭtralaj ŝipoj ne plu grave estas pliigebla. La ebleco por novkonstruoj sumiĝas en unu jaro je 2,5 ĝis maksimume 4 milionoj da tunoj; sed la Entente-gazetoj por ŝipveturado en Oktobro frapante silentas pri novkonstruoj de ŝipoj kaj igas ŝajni la atendojn pri la amerika helpo tre malgrandaj. [N. A. Z. 379]

La mensoga milito

Pri la situacio de la belgoj en Germanujo

Admirinda estas la senlaceco, per kiu la ĵurnalistoj de Entente klopodas konvinki la mondon, ke la sorto de la laborantaj en Germanujo belgoj estas la plej maldolĉa, kiu iam trafis homojn. Kvankam tiuj ĉiutagaj frazabundoj per si mem elvokas jam la impreson de ĝemadoj elpensitaj apud la skribotablo *ad usum Delphini*, tamen

ilia malvereco estas precipe hele lumigata, se oni komparas kun ili eldirojn, kiuj devenas de la koncernatoj mem. Kion diras la majstroj de la belgaj incitgazetoj en Holando kaj Francujo, se ili aŭdas, ke belgo, laboranta en Duisburg, skribas:

Mi tre bonfartas en Germanujo; mi perlaboras bonan salajron kaj ne povas plendi pri la nutrado. Kaj kia popolo! Lojala, honesta kaj laborema! Neniam ili malplenumas promeson, kaj ili estimas eĉ siajn malamikojn. Ni belgoj estas intimaj kun ili kiel fratoj. Kaj jen estas la popolo, al kiu oni donas la nomon „barbaroj“?! Pri tio oni nur povas suprentiri la ŝultrojn. Mi estas preskaŭ kvindekjarulo, vidis multajn landojn kaj neniam tie ĉi renkontis tiun malnoblecon, kiun oni alie observas, eĉ en Francujo, la laŭdire kavalira nacio! Forta, sana popolo, plena de patriotismo, modesta, sed plena de oferemo kaj forta devokoscienco. Jen la popolo, kiun oni volas pereigi, kiun oni ofendas kaj kalumnias! Mizera metio, per kiu sin okupas tiu gazetaro, vendita al la perfida Albiono kaj al la mizera franca registaro, kiu blindigas sian popolon per la grandaj paroloj pri la revenĝo. Mi estas ĉi tie nur simpla terlaboristo, sed ĉiutage mi interrilatas kun la germanoj kaj malkaŝe mi konfesas: jen granda popolo, kaj kun estimo oni devas riverenci antaŭ ĝiaj ecoj.“

Mallonge kaj draste la opinio pri la profitoj, kiuj prezentas sin al la laboremuloj en Germanujo estas esprimita en letero de flamlandino:

„Ĉiuj, kiuj estis en Germanujo, havas monon kaj vestojn kaj plenan ventron. Ili diras: Se mi estus sciinta tion antaŭe, mi ne estus restinta tiom longtempe en Belgujo kaj ne suferinta tiom da malsato.“

Tia estas la realeco! La malamikaj skribaĉistoj per tio ja certe ne estos instigitaj, forlasi la ĝisnunan skribmanieron, ĉar ili devus forlasi sian metion, se ili volus rezigni la aferon de la mensogo kaj kalumnio. [N. A. Z. 221 II]

Edukistoj de la franca junularo

Jam antaŭ la milito oni de germana flanko ofte citis kiel elstarantan distingilon de la franca pedagogio la sisteman venenadon al la infana animo per la malamo kontraŭ la „hereda mal-

amiko“ Germanujo. Niaj soldatoj en la okcidento, trafolumante lernolibrojn, geografiajn kaj historiajn verkojn, ĉiam denove havis okazon, konstati la veron de tiu observado. Laŭnature la milito, kiu ekscitis la plej malnoblajn pasiojn nenie pli ol en Francujo, tie treege plifortigis la tendencon, inokuli en la korojn de la infanoj la malamon kontraŭ Germanujo. Per kiaj vere barbaraj rimedoj oni laboris, montras rigardo en francajn gazetojn por infanoj, el kiuj ni havas antaŭ ni ekzempleron de la ilustrita semajna ĵurnalo „L'Epatant“. De la unua ĝis la lasta paĝo ĝi enhavas nur stultajn aŭ cinikajn insultojn pri la germanoj. Kelkaj specimenoj sufiĉu.

En la ilustrita humoraĵo „La Boche-kaptilo“ belgo logas per diversaj lertaj aranĝoj germanan soldaton en speciale konstruitan kaptilon, malbone traktas lin kaj fine dronigas lin. Poste sekvas ĉapitro el la rakontaĉo „Le roi des boxeurs“ (La reĝo de la boksisoj), en kiu la ĉefpersono kaj lia armena kamarado en Erzerum ekkaptas „treege dikan germanan generalon“. Tiokaze la armeno frakasas la kranion de turko, dum li enventrigas sian bajoneton al dua kaj de dorse trapikas trian. Similaj malnoblaĵoj pri la germana imperiestro kaj la kronprinco kompreneble plenumas tutajn paĝojn.

Per tiuspeca spirita nutraĵo la moderna Francujo, kiu ankoraŭ ĉiam sin kredas pioniro de la civilizacio, nutras siajn kreskantajn generaciojn! Kio povas fariĝi el junularo, en kiu oni tiamaniere ekstermas senton pri konveno kaj indeco — pri homamo kaj kavalireco ne estu parolate — por ke ne estingiĝu la histeria malamo? [D. K. 138]

Redakcia korespondo

Al niaj legantoj

ni sincere deziras feliĉan novan jaron! Multaj el ili jam skribe esprimis al ni la recipokan deziron. Al ili ni speciale dankas pro ilia afableco; sed kun ĉiuj ni esperas, ke la nuna jaro estos la lasta de l' terura milito kaj ke ĝi alportos al la mondo la multe deziregatan pacon kaj la komencon

de sincera interkonsento inter ĉiuj popoloj por la bono de la tuta homaro.

Ĉi tiu numero de I. B. estas la unua de la *kvara kolekto*. Ni uzis la okazon de nove komenciĝanta kolekto, por enkonduki kelkajn ŝanĝojn.

Unue: Pro teknikaj kaŭzoj ni devis iom plimalgrandigi la formaton de I. B.; sed per aplikigo de alia kompostmaniero ni kompensis la rezultantan el tio mallongigon de la tekstlinioj.

Due: Konsiderante, ke multaj legantoj ŝatas legi ankaŭ ion alian krom la informoj pri la milito, ni de nun aperigos la aldonon *Literatura Revuo*, kiu espereble plaĉos al ĉiuj legantoj. En ĝi ni unue publikigos tre interesan, originale verkitan kriminalromanon, kiu daŭros ĝis la fino de la nuna jarkolekto.

Trie: Pro la multe plialtiĝintaj kostoj por presado kaj papero kaj pro la malabundeco de ĉi tiu, ni bedaŭrinde ne plu povas pligrandigi la eldonkvanton. Sekve de tio ni ne plu povas senpage sendi nian gazeton al novaj interesemuloj. Jam en la pasinta jaro ni ne povis plenumi ĉiujn novajn dezirojn pri senpaga alsendo, des pli la dirita cirkonstanco en la nuna jaro devigas nin al ŝparemo. Pligrandigi la eldonkvanton je malprofite de la amplekso de I. B. ni ne povas kaj ne deziras pro la multa materialo publikigota. Tamen

ni esperas, ke novaj interesemuloj trovos nian gazeton sufiĉe interesa kaj valora — speciale por la propagando de Esperanto —, por oferi la proponite malaltan abonprezon. *Specimenajn numerojn* ni poste kiel antaŭe dissendos senpage. La ĝisnunajn abonantojn ni petas, ankaŭ en la nova jaro resti fidelaj al ni, por firmigi la fundamenton de I. B., kiu, laŭ nia intenco, post la milito estos daŭrigata kiel grava komunikilo por internaciaj rilatoj.

Laŭ ofte esprimitaj al ni deziroj ni intencas eldoni ĝeneralan *indekson por la tri unuaj kolektoj*, kondiĉe, ke sufiĉe granda nombro da legantoj deziros havi tian. Por tiurilate informi nin, ni petas, ke la legantoj, dezirantaj ricevi la indekson, skribu al ni poŝtkarton. Por ke ĉi tiu kiel eble plej certe atingu nin, oni prefere bonvolu skribi germanlingve (pro la poŝtcenzuro); sufiĉas la jena teksto: „Ich wüſche ein Inhaltsverzeichnis zu Internacia Bulteno, 1.—3. Sammlung.“ (Subskribo kaj adreso).

Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto-Servo)
Berlin S 59

J. H. Kr-off. — Ni dankas vin pro la alsendo de via interesa artikolo, kiun ni supozeble povos publikigi en la venonta numero. Korajn salutojn!

sed la murdafero evidente tute estis konsterninta lin. „En sako oni trovis la kadavron de juna, bela sinjorino; de la krimulo ne ekzistas, kiel mi jam telegrafis, ia postsigno, eĉ ne laplej malgranda. Vi havos tre malfacilan taskon, sinjoroj!“

„Kie oni trovis la kadavron?“ demandis Moser.

„En arbaro, proksimume unu horon de ĉi tie. La distriktojugo antaŭ ne longe revenis de tie, kaj li telegrafis ankaŭ al la prokuroraro. Sed la prokuroro verŝajne venos nur morgaŭ, alie li jam estus ĉi tie.“

„Kiam oni trovis la kadavron?“

„Hodiaŭ matene ĉirkaŭ la sepa.“

„Kiu trovis ĝin?“

„Arbaristo Jansen, aŭ pli vere lia hundo, kiu kondukis lin al la loko de l' trovo.“

„Ĉu la kadavro ankoraŭ estis freŝa?“
„Tute freŝa. Doktoro Osten opinias, ke la krimo povas esti farita nur en la pasinta nokto. Tiel bela, junasinjorino! Vere, estas tre domaĝe!“

„Ĉu vi kiel eble plej baldaŭ povas havigi al ni veturilon, por ke ni povu veturi al la loko de l' trovo? Ĉu la kadavro ankoraŭ kuŝas tie?“

„Certe ĝi ankoraŭ estas tie. Mi relasis tie policiston, kaj ankaŭ la ĝendarmo verŝajne ankoraŭ estos tie. Ĉu mi telefonu al ekspedisto Solm pro veturilo?“

„Mi petas.“

La urbestro iris al la telefono kaj tre baldaŭ revenis, sciigante, ke la veturilo venos post kvarona horo.

„Vi do akompanos nin, sinjoro urbestro?“

„Se estas necese, jes.“

„Ne estas nepre necese, sed estus dezirinde, ĉar supozeble pri kelkaj punktoj mi devos peti informojn.“

„Nu, bone, mi kuniros.“

La veturilo alvenis, kaj ili veturis tra la malglataj stratetoj de la urbeto, poste laŭlonge sur ŝoseo, kiu unue kondukis tra kampoj kaj herbejoj, poste tra arbaro. Poste ili flankeniĝis en arbarvojon. Post kiam ili ĉi tiun estis laŭveturintaj proksimume kvaronan horon, ili forlasis la veturilon kaj laŭiris piedvojeton. En densejo kuŝis la sako enhavanta la kadavron, gardata de la policisto. La ĝendarmo estis irinta hejmen, por skribi sian raporton kaj poste reveni.

Moser singardeme fortiris la sakon de la tute nuda kadavro, kiun li atente rigardis.

„Nu, ĉu vi vidas ion rimarkindan je ĝi?“ demandis la urbestro, al kiu la afero ŝajne daŭris tro longe.

„La murditino apartenis al la unuaj klasoj de la societo, estis vidvino, havis bonan porvivon, lastatempe restadis aŭ almenaŭ antaŭ mallonga tempo estis en Sudeŭropo, laŭŝajne estas anglino kaj tre multe okupiĝis pri verkistaj laboroj.“

„Ĉion tion vi povas vidi je la kadavro?“

„Eĉ tre klare. Vidu la bone fleĝitajn manojn kaj piedojn. Bone fle-

ĝitajn manojn oni trovas tre ofte, sed zorgeman flegadon de la piedungoj nur en la pli altaj klasoj de la societo, jam pro tio, ke ĝi ĉiam devas esti farata de alia persono. Kaj jen, vidu!“ Li kaptlevis delikatan, nigran fibreton, kiu elstaris inter la dua kaj tria piedfingro de la maldekstra piedo, apenaŭ rimarkeble. „Kio estas tio?“

„Peceto da fadeno“, diris la urbestro, post kiam li atente estis rigardinta ĝin.

„Tute prave. Kaj el kia ŝtofo?“

„Tion mi ne scias.“

„El silko.“ Moser tiris grandigan vitron el la poŝo kaj donis ĝin al la urbestro. „Si do surhavis silkajn ŝtrumpojn, plia signo de ŝia klaso. Kaj nun rigardu la piedon entute, kion ĝi rimarkigas?“

„Al mi nenion, mi senkaŝe devas konfesi.“

„Escepte de la plando, ĝi nenie havas eĉ nur malgrandan malmoliĝon de la haŭto. Do la sinjorino ĉiam surhavis precize adaptitajn ŝuojn. Laŭ tio ŝi ne aĉetis siajn ŝuojn en magazeno, sed farigis ilin laŭ mezuro. Tio estas multe pli kosta, do parolas por tio, ke ŝi havis bonajn enspezojn, same kiel la silkaj ŝtrumpoj.“

„Tio estas ĝusta. Sed plie: Kial ŝi estas anglino?“

„Tion mi ankoraŭ ne certe asertas, sed estas verŝajne. Rigardu ankoraŭ foje la piedon, piedoj estas tre instruaj. La plando estas plata. Tio ne povus esti, se ŝi, kiel la plej multaj sinjorinoj, estus portinta ŝuojn kun altaj kalkanumoj, por ŝajni la piedojn pli malgrandaj. La kutimiĝo al altkalkanumaj ŝuoj sekvigas kurbiĝon de la piedoj tiamaniere, ke la antaŭa parto pli malsupreniĝas, kiel okazas plej multe ĉe la hinoj. De tio sin montras ĉi tie nenia signo. Sed plej multe la anglinoj emancipis sin de tiu stulta modo. Ankaŭ la abunda, hele-blonda hararo kaj la delikata vizaĝkoloro de la mortigitino plej ofte estas troveblaj ĉe la anglinoj. Sed plie: la vizaĝo kaj kolo de ĉi tiu sinjorino estas iom brunigintaj, dum la manoj estas tute blankaj. Se la malforta brunigo devenus de la suno

Literatura Revuo

Pro kio?

Internacia kriminal-romano
originale verkita de *Argus*

Unua ĉapitro

„Rabmurdo, nenia postsigno, tuj sendu kapablan oficiston — urbestro.“

Sekve de ĉi tiu telegramo direktita al la reĝa ĉefpolicejo en Berlin, kriminalkomisario Moser kune kun kriminalpolicano Kruse estis sendata al la urbeto Altburg, el kiu venis la telegramo. Ili tuj forvojaĝis kaj iom post la tria horo posttagmeze alvenis en Altburg. Tie ili iris al la urbestro, kiu en tiaj malgrandaj lokoj estas ankaŭ la ĉefo de la polico.

„Ni trovas nin antaŭ mistera afero“, diris la urbestro, akceptante la du oficistojn. Li estis afabla, maljuna sinjoro,

en nia regiono, ĝi jam de longe estus malaperinta, ĉar ni nun estas en Marto. Do ŝi vivis en la sudo, verŝajne en Italujo aŭ en la Riviero. Se ŝi estus restadinta sub la tropika suno, la brunigo estus pli forta.“

„Ankaŭ tio nun estas klara al mi.“

„Nun rigardu la manojn. Jen, sur la ringfingro de la dekstra mano ĉirkaŭiĝas du egalaj, iom pli helaj strioj; tiu al la mano estas iom malklara, tiu al la fingropinto pli klara. La sinjorino do surhavis du edzecajn ringojn, la propran, bone adaptitan antaŭe, kaj post ĝi tiun de sia mortinta edzo. Ĉi tiu ringo kompreneble estis pli granda; pro tio ĝi ŝoviĝis sur la fingro kaj posttlasis malpli klarajn postsignojn. Do ŝi estis vidvino.“

„Kaj la okupo pri verkistaj laboroj?“

„Ĝi estas pruvata per la tre malforta malmoligo flanke sur la meza fingro de la dekstra mano, tie, kie ĉe la skribado oni premas la plumington kontraŭ la fingro. Nun la sako. Kiel vi vidas, ĝi estas signita B. K. Ĉu en la proksimeco de ĉi tie ekzistas bienposedanto kun tiu nomo?“

„Laŭ mia scio, ne. La murdisto eble kunportis la sakon.“

„La sako verŝajne estas de la bieno Karlshof“, diris la policisto, kiu atente estis aŭskultinta.

„Ĉu tia bieno estas proksime de ĉi tie?“

„Ho, ke mi ne pensis pri ĝi! Kompreneble. La kampoj antaŭ la arbaro apartenas al ĝi“, respondis la urbestro, montrante orienten.

„En tiu direkto, laŭ mia opinio, ankaŭ la fervojo preteriras?“ Moser demandis.

„Jes, sed ĝi estas ankoraŭ duonan horon pli malproksima, aŭ minimume kvaronan horon.“

„Verŝajne estas nur kvarona horo. Ne povas esti, ke la murdisto nur ĉi tie premegis la kadavron en la sakon, por tio ĝi jam estus estinta tro rigida. La artikoj ankoraŭ fleksiĝis, kiam li faris tion. Verŝajne nur post ekvido de la sakoj, kiujn oni dum la nokto lasis sur la kampo, li ekpensis agi tiel. Ankaŭ la difekto de la haŭto sur la maldekstra vango estas kla-

rigebla nur per tio, ke la kadavro tuj post la murdo estis ĵetata el la kupeo. Ĉu tie estas fervoja digo?“

„Kelkaloke, de malgranda alteco. Sed ĉu la difekto de la haŭto ne povas esti okazinta ĉe la enmeto de la kadavro en la sakon?“

„Tiukaze la sango ne plu estus eliĝinta. Sed ĉi tie estas iom da sekiĝinta sango sur la vango. Krome ankaŭ la sako sur la interna flanko devus montri sangmakulon, kaj tio ne estas.“

„Sed kial ne estas haŭtodifektoj sur la manoj?“

„Ĉar la sinjorino surhavis gantojn kaj ĉar la falego ne estis tiel forta, por krevigi ilin. Sed nun ni volas serĉi postsignon, antaŭ ol noktiĝos.“

Moser iris tra la arbaro al ties rando, por poste kune kun Kruse esplori ĉi tiun. Sur la tero, malsekigita per degelinta neĝo, ankaŭ pli malnovaj postsignoj ankoraŭ klare markiĝis. Subite Moser ekhaltis. „Jen la postsigno de la murdisto“, li diris.

„El kio vi vidas tion?“ la sekvinta urbestro demandis.

„El la profundo de la enpremo. Tiu, de kiu devenas ĉi tiu postsigno, portis pezan ŝarĝon. Sed ne estis arbaristo aŭ kamplaboristo, sed viro el la societo. La enpremo klare montras elegantan ŝuajon.“

Moser klinis sin teren, por precize mezuri kaj skizi la enpremojn; poste li laŭiris ĉi tiujn malantaŭen trans la kampon.

„Ĉi tie la murdisto senvestigis la kadavron kaj metis ĝin en la sakon“, li diris, alveninte en loko, kie ankoraŭ kuŝis pluraj, parte plenigitaj, parte malplenaj sakoj kaj kie la tero estis forte trafosita. „Serĉu ĉi tie plej detale, Kruse, ĉu vi trovos ion. Dumtempe mi plue laŭiros la postsignon.“

Ĝi kondukis, kiel li estis supozinta, al la fervoja digo. Tamen ĝi ne finiĝis tie, sed laŭiris apud la digo. La murdisto evidente estis veninta de la proksima stacio, de Altburg. Ĝis tie li, post kiam la kadavron li estis ĵetinta el la vagono, ankoraŭ estis veturinta. En Altburg li estis forlasinta la vagonaron kaj poste reirinta.

kadavro estis elĵetata, devas esti precize esplorata.“

„Sed estas jam tro malluma, sinjoro kriminal-komisario.“

„Por tio mi havas mian lanternon.“ Alveninte en la loko de la fervoja digo, kie la postsigno de la murdisto deflankiĝis de ĝi, Moser ekbruligis sian lanternon kaj komencis plej precize efektivigitan esploron. Rompe difektitaj branĉoj signis la lokon de la surfalo. Je unu el ili pendis malgranda strio de flave-griza ŝtofo, kiu Moser metis en sian leterujon. Same tien li metis pecon da papero, kiu kuŝis malproksime inter altaj herboj kaj sur unu flanko montris la jenan surprizon

Te
Fakt
P
Sinjorino A
Granda Hotelo

Senpere sub kaj post tiuj vortoj la papero estis forŝirita. Sur la alia flanko troviĝis kraĵone skribita noto: „T. 11. 40, L. 5. 29.“

Tio estis ĉio; ia alia objekto malgraŭ plej zorgema esploro ne estis trovata.

„Ĉu vi opinias, ke tio iel estas valora?“ la urbestro demandis kun senluziigita mieno.

„Certe. La papereto ĝuste estas eksterordinare grava por la trovo de la murdisto, kaj verŝajne ankaŭ la peceto da ŝtofo, kiu sendube devenas de la vestaĵo de la murdistino. Por vi eble ne“, Moser ridetante respondis. „Kion mi konkludas el la trovadoj, vi vidos hodiaŭ vespere. Nun al la stacio.“ —

La fervoja asistanto, kiu la pasintan nokton deĵoris, revenis nur post kelka tempo por la venontnoka deĵoro. Sed la suboficisto, kiu ĉe la peronbarilo kontrolas kaj deprenas la biletojn, ĉeestis.

„Ĉu vi memoras, kiu en la pasinta nokto forlasis la vagonaron ĉi tie?“ Moser demandis lin.

„La rapidvagonaron, kiu haltas ĉi tie nur, kiam la princo venas por ĉasi, kio hodiaŭ ne okazis, kompreneble neniu forlasis, ĉar ĝi senhalte tra-

„Kiom distance estas de ĉi tie ĝis la stacio Altburg?“ Moser demandis la urbestron.

„Apenaŭ dek minutojn. La stacio bedaŭrinde estas tre malproksima de la urbo, pli ol duonan horon.“

„Ĉi tie li rapide kuris“, Moser daŭrigis, ne atentante la plendon de la urbestro.

„El kio vi vidas tion?“

„La enpremoj de la piedfingroj estas multe pli profundaj ol tiuj de la kalkanoj. Lia rapido cetere estas tre facile klarebla: li devis timi, ke fervoja gardisto, kontrolanta la relvojon, aŭ iu alia rimarkus la kadavron, kvankam la loko, kie li elĵetis ĝin, estis tre bone elektita. La malaltaj pinglarbetaĵoj, kiuj certe estas plantitaj por ŝirmi la relvojon kontraŭ terŝoviĝoj aŭ neĝblovaĵoj, devis sufiĉe kaŝi la korpon. Ni devos fari niajn esplorojn ankaŭ en la stacio, sed nun ni volas ankoraŭ uzi la malaperantan taglumon, por laŭiri la postsignon al la alia flanko.“

Ili reiris al la loko, kie Kruse ankoraŭ fervore serĉis. Ne interrompante lin eĉ nur per unu demando, Moser poste sekvis la postsignon de la murdisto, facile ekkoneblan sur la malseketa kampo.

Ĝi kondukis rekte al la densaĵo, en kiu la kadavro estis trovita. De tie ĝi ne plu estis ekkonebla, post kiam pluraj homoj, certe ankaŭ scivolemuloj, al kiuj la arbaristo rakontis pri sia trovaĵo, estis irintaj tie. Moser pro tio encirkligis la lokon. Li ĉirkaŭiris ĝin en distanco de unue proksimume dudek, poste de duoble tiom da paŝoj, kun speciala atento observante la flankon for de la fervojo, kaj efektive sur ĝi retrovis la jam konatajn de li piedajn postsignojn. Li tuj konstatis ilin per komparo kun la farita skizo. Nun li plue laŭiris la postsignon. Ĝi kondukis en akuta angulo al la ŝoseo, sur kiu ili antaŭe estis veturintaj. Ĉi tie, sur la malmola kaj multe pli suririnta vojo, ne plu estis eble, daŭrigi la laŭiradon de la postsignoj, des malpli, ĉar la nokta mallumo jam komenciĝis.

„Nun ankoraŭ la loko, en kiu la

„Certe; sed la ordinaran vagonaron?“

„Kiun?“

„Ĉu pluraj ordinaraj vagonaroj dumnokte pasas ĉi tie?“

„Laŭ ĉiu direkto unu.“

„Do mi celas tiun de Reberg.“

„Ĝin forlasis la arbarasistanto kaj fremdulo.“

„Kiel aspektis la fremdulo?“

„Tre precize mi ne rigardis lin. Sed estis granda, maldika sinjoro, kaj ankoraŭ juna, proksimume tridek-jara, kun granda nigra liphararo kaj bluaj okulvitroj. Jes, kaj li parolis iom strange.“

„Vi parolis kun li?“

„Jes. Li havis bileton, kiu valoris pli malproksimen, kaj li demandis, ĉu li povus senplue daŭrigi la vojaĝon aŭ ĉu estus necese, atestigi la interrompon sur la bileto.“

„Ĝis kie valoris la bileto?“

„Tion mi ne plu scias.“

„Meditu!“

La oficisto meditis kelkan tempon kaj fine diris: „Efektive, mi ne plu scias tion.“

„Ĉu estis granda stacio?“

„Mi ne kredas.“

„Se vi ankoraŭ ekmemoros la nomon de la stacio, tuj sciigu ĝin al sinjoro la urbestro. Estas tre grave. Vi diris, ke li iom strange parolis. Kiamaniere?“

„Tiel — tiel larĝe — tiel malrapide — germano li ne estis.“

„Eble tiel: Ĉu la vojaĝinterrompo devas esti atestata?“ Moser elparolis ĉi tiujn vortojn kun angla akcento.

„Jes, jes, precize tiel estis.“

„Ĉu vi dum la tago revidis lin, eble, ke li daŭrigis sian vojaĝon?“

„Ne.“

„Tion vi scias certe?“

„Tute certe.“

„Ĉu vi ankaŭ dum la tago konstante deĵoris ĉe la peronbarilo, post kiam vi havis noktan deĵoron?“

„Jes. La nokta deĵoro ne estas tro malfacila. Mi dormas en la stacidomo, kaj kiam la vagonaroj estas alvenontaj, la ĉefdeĵoranto vekas min.“

„Kun la asistanto la fremdulo ne parolis?“

„Ne, el la vagonaro li venis tuj al mi.“

„Bone, mi dankas vin.“ — —

Moser kaj la urbestro reiris al Kruse, kiu sur la montrita al li loko ne estis trovinta ion alian ol malgrandan ŝtalan ringon, uzeblan por plej diversaj celoj; ĝi estis iom disfleksita. Ankaŭ ĉi tiun Moser enpoŝigis. Poste li igis meti la kadavron kune kun la sako, en kiu ĝi estis trovata, en la veturilon uzitan de ili kaj reiris, akompanate de la urbestro kaj Kruse, al la urbeto.

Lian profundan meditadon interrompis la demando de la urbestro, ĉu li opinias, ke la fremdulo, pri kiu la fervoja oficisto parolis, estas la farinto de la murdo.

„Plej verŝajne. Cetere ni baldaŭ tute precize scios tion.“

„Kiamaniere?“

„Ni devos konstati, ĉu en la pasinta nokto iu fremdulo gastigis en la urbo.“

„Nek en la hotelo, nek en privata domo. Tion mi jam esploris.“

„Ho, tre bone, tio ŝparas tempon al ni. Sed, ĉu eble en la vilaĝoj kaj bienoj en la ĉirkaŭaĵo?“

„Ankaŭ ne. Tion la ĝendarmoj jam hodiaŭ antaŭtagmeze konstatis. Li ĉien estis ĉirkaŭrajdanta.“

„Bonege! Nun ni scias, ke la fremdulo estis la murdisto, aŭ almenaŭ, ke li interrilatas kun la murdo, se tia estas farita.“

„Tio certe ne estas dubinda.“

„Ni devas ĝisatendi la sekcon. Espereble la kuracisto kun certeco povos konstati la kaŭzon de l' morto.“

„Nia distrikta ĉefkuracisto estas tre kapabla.“

„Pri tio mi ĝojas. Al mi la kaŭzo de l' morto ĝis nun estas tute enigma. la postsigno de ekstera vundo ne estas trovebla sur la kadavro. La morto do devas esti kaŭzita en alia maniero ol per ekstera efiko. Sed en kia? Veneno kaŭzas spasmosimilajn aperaĵojn, kiuj postlasas siajn signojn en la vizaĝo. Sed la vizaĝo de la mortintino estis tiel kvietita, kvazaŭ ŝi dormus.“

„Hm. Sed kiel alie la morto povus esti kaŭzita?“

„Tio ankoraŭ estas enigmo, kies solvon espereble alportos la sekco. Ĉu la distrikta ĉefkuracisto ĝin faros ankoraŭ hodiaŭ vespere?“

„Li jam diris, ke tio devas okazi, por ke organaj ŝanĝoj eble ne malfaciligu la konstaton de la kaŭzo de l' morto.“

„Li estas prava.“

„La murdisto verŝajne veturis per la rapidvagonaro ĝis la plej proksima stacio, kie ĝi haltis, kaj poste revenis ĉi tien per la ordinara vagonaro.“

„Sendube. Kaj la elekto de ĝuste tiu loko, proksime de stacio, kiun li tiel rapide ree povis atingi, supozigas zorgeman pripensadon de la faro.“

„Nur tion mi ne komprenas: Kial li ne aĉetis bileton ĝis ĉi tie, sed al pli malproksima stacio?“

„Por malaperigi sian postsignon por la kazo, ke lia faro estus malkaŝata pli frue ol li esperis, ke tio okazos.“

„Kaj kien li poste turnis sin?“

„Verŝajne al la plej proksima stacio, al Reberg.“

„Kial ne al la kontraŭa direkto?“

„Li prenis kun si, kiel ni scias, ĉiujn vestaĵojn kaj ĉion ceteran de la murditino; eble li ankaŭ ŝian manpakajon aŭ sian propran eljetis el la vagonaro kaj poste kunprenis ĝin. Sed sinjorino el tiaj societaj rondoj, al kiuj la murditino sendube apartenis, faras iom grandan vojaĝon ne nur kun manpakajo. Certe ŝi ekspedigis unu aŭ plurajn kofrojn aŭ ion similan kiel pasaĝerpakajon. Ĉi tiun pakajon li devis havigi al si, eĉ se nur tial, por ke ĝi ne servu konstati la identecon de la kadavro, kion li ĉiucirkonstance provis malebligi. Ke nur pro tiu celo li forigis la vestaĵojn de la kadavro kaj ĉi tiun metis en sakon, pri tio ne ekzistas dubo. Sed, ĉu li faris tion nur, por sekurigi sin mem, aŭ ĉu li celis ankoraŭ ion alian? Jen la demando, kiun mi ĝis nun ne povas respondi.“

„Ankaŭ mi ne“, diris la urbestro.

„Tion mi kredas.“ Moser ridetis.

„Ĉu vi nun volas plue sekvi la postsignon de la murdisto?“

„Certe!“

„Sed tiukaze vi devas iri al la plej proksima stacio.“

„Unue ankoraŭ alia konstato estas necesa. Kiu ĉi tie en la urbeto havas detalan horarlibron?“

„La mastro de l' Nigra Aglo.“

„Bone, ni iru tien.“

Alveninte en la hotelo „Nigra Aglo“ la kriminal-komisario tuj igis doni al si la horarlibron. Li serĉis en ĝi nur kelkajn minutojn kaj poste remetis ĝin.

„Nu?“ la urbestro demandis.

„Kiuj estas la homoj tie, kiuj scivole rigardas nin?“

„Ĉiuj estas burĝoj el nia urbo.“

„Ĉu neniu fremdulo estas inter ili?“

„Ne.“

„Eĉ kontraŭe al konatuloj bonvolu esti tre singardema rilate al via scio pri la murdafero, sinjoro urbestro. Pripensu, ke ĉio, kion mi diris al vi, estas konsiderota kiel ofica sekreto, kaj ke la plej malgranda maldiskreteco povas efiki tre malutile. Venu al mi tute proksime, Kruse.“

La kriminal-policano obeis la ordonon.

„Per la plej proksima rapidvagonaro veturu al Teplitz. Car tiu vagonaro ne haltas ĉi tie, vi devas veturi al Reberg per la ordinara vagonaro. Morgaŭ matene esploru, el kiu hotelo en Teplitz devenas ĉi tiu fakturo.“ Moser transdonis al la policano la paperecon trovitan apud la fervoja digo.

„El kio vi scias, ke tiu fakturo estas el Teplitz?“ la urbestro demandis.

„Multaj vojaĝantoj, precipe sinjorinoj, notas, antaŭ ol ili uzas vagonaron, la horon de la forveturo kaj la horon de la alveno. La rapidvagonaro, el kiu la kadavro estis elĵetata, komunike aliĝis al la vagonaro, kiu je la 11⁴⁰ h. vespere forveturis el Teplitz. Do la fakturo devenas el Teplitz, ĉar la tempo, kiun mi ĵus citis, estas notita sur ĝi. Sed je la 5²⁹ h. — t. e. la alia, post la litero L. notita nombro — la vagonaro alvenas en Leipzig. Tien la murdisto verŝajne veturis, por akcepti la pasaĝerpakajon. Tien ankaŭ mi veturos. Ĝis la

forveturo de la ordinara vagonaro al Reberg ni havos ankoraŭ tempon de du horoj. Ni uzu ĝin, por iom manĝi. Espereble ni intertempe ekscios la rezulton de la sekco.“

„La distrikta ĉefkuracisto komencis ĝin tuj post alveno de la kadavro“, rimarkigis la urbestro.

„Eble vi povus instigi lin, informi nin tuj, post kiam li konstatis la kaŭzon de l' morto.“

„Certe. Ĉu mi irigu senditon al li? Aŭ ĉu eble mi mem iru?“

„La lasta certe estus pli preferinda, kvankam mi malvolonte rezignus pri via agrabla ĉeestado.“

La urbestro flatite klinis sin kaj foriris. Post duona horo li revenis.

Moser atendeme rigardis lin.

„Ne estas murdo“, la urbestro flustris al li. „Almenaŭ ĝi ne estas konstatebla per la sekco.“

„Mi jam supozis tion. Ĉu vi bonvolus havi la afablecon, konduki min al la distrikta ĉefkuracisto?“

„Tre volonte. Sed estas senutile. Li esprimis sin tute certe.“

„Nu, ni vidos.“ — —

La distrikta ĉefkuracisto konfirmis, ke li ne trovis ian signon de perforta mortigo. Laŭ lia opinio la morto plej verŝajne estis sekvo de korapopleksio.

„Ĉu korapopleksio povas okazi per troa enspiro de kloroformo?“ Moser demandis.

„Certe. Kial vi demandas pri tio?“

„Mi scias, ke dentkuracistoj, farontaj operacion kun kloroformnarkoto, devas ĉeestigi mediciniston, ĉar tro longa aŭ tro profunda narkoto povas efiki malutile, eĉ sekvigigi la morton. Nu, ĉe la esploro de la sako min frapis strange dolĉa, malfortaodoro, kia ĝi estas karakterata al kloroformo. Ĉu kloroformo ankoraŭ nun estas konstatebla en la pulmo?“

La kuracisto meditis momenton.

„Estus eble“, li poste diris, „se la laste enspirita kloroformo estus trovinta la sangon en la pulmo jam saturiĝinta per la antaŭe enspirita kloroformo. Ni provu efektiviĝi artefaritan spiradon.“

La provoj restis sensukcesaj. Verŝajne dum la transporto aŭ ĉe la enpremo de la kadavro en la sakon la brusto estis kunpremata tiel, ke la aero troviĝinta en la pulmo eliĝis.

„Sed la kloroformo en la sango verŝajne ankoraŭ estas konstatebla per hemia esploro!“ la distrikta ĉefkuracisto subite ekkriis.

„Kvankam la sango jam de longe rigidigis?“

„Ĝuste pro tio. La rigidigo malhelpas putriĝon. Bedaŭrinde mi ne estas sufiĉe kapabla hemiisto, sed la farmaci-helpanto en nia apoteko estas viro sperta en sia fako. Mi sendos al li pecon de la pulmo kun arteria sango kaj pecon el la ĉefarterioj kaj petos lin, tuj komenci la esploron.“

„Mi petas, faru tion, sinjoro doktoro. Bedaŭrinde mi ne povas ĝisatendi la rezulton, estas urĝa tempo, ke mi veturu al Leipzig.“

„Kiam vi revenos?“

„Tio ankoraŭ ne estas tute difinita. Mi devas plue sekvi la postsignon de la murdisto.“

„Ĉu vi esperas trovi lin?“

„Kompreneble mi esperas tion, kvankam mi ne dubas pri tio, ke li tute certe estas same ruza kiel maltimema krimulo.“

(*Daŭrigota*)

Enhavo de ĉi tiu numero

Politiko kaj ekonomio: Pri la pacintertraktoj en Brest-Litovsk — Novjara proklamo de la germana imperiestro — Parolado de la germanimperia kanceliero Dro grafo v. Hertling — Ŝtatssekretario von Kühlmann en la Ĉefkomisiono de Reichstag — Imperiestro kaj caro — La imperiestraj manskribaĵoj al la pola vicregnestra konsilantaro — La germana imperiestro en la batalo por la mondpaĉo

Milito kaj militado: La militaj okazintaĵoj — 390 500 kaptitoj, 45 500 kvadratkilometroj, 3233 pafitejoj! — 8047 000 tunoj surfundigitaj

La mensoga milito: Pri la situacio de la belgoj en Germanujo — Edukistoj de la franca junularo — Redakcia korespondo — bildoj — anoncoj

Literatura Revuo: Pro kio?